



EL POPOLO CINO

人民中國報

5



Laboristaj amasoj entuziasme krias: "Vivu Prezidantō Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!"



La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kune kun sia
intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin sur la pordego Tian-anmen

ĈAŬ JANG:

Neelĉerpebla Saĝo de la Laborista Klaso


—pri naskiĝo de 125,000-kilovata vaporturbina generatora kompleto kun duobla akva interna malvarmigo

VENKE naskiĝis kaj normale ekfunkciis en Ŝanhajo la unua 125,000-kilovata vaporturbina generatora kompleto kun duobla akva interna malvarmigo kiun projektis, faris kaj instalis la laborista klaso de Ĉinio mem sub la gvido de la granda orientilo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”.

En kaldronego kaj vaporturbino de tiu ĉi vaporturbina generatora kompleto kun monda progresinta nivelo estas aplikitaj ne nur mondaj progresintaj teknikoj kiaj alta varmo, alta premo kaj intera revarmigo, sed ankaŭ la plej nova malvarmiga tekniko de duobla akva interna malvarmigo kreita de la laborista klaso de nia lando, nome: rekta akvomalvarmigo de ambaŭ statoro kaj roto-



La revoluciaj laboristoj, kiuj konstruas la 125,000-kilovatan vaporturbinan generatoran kompleton kun duobla akva interna malvarmigo, estas en studo de dokumento de la Naŭa Kongreso de la Partio ĉe la konstruejo.



La laboristoj, teknikistoj kaj gvidaj kadroj de la grupo de triflanka kombiniĝo interkonsiliĝas pri muntado.

ro. La generatora kompleto kun granda kapacito havas malgrandajn volumenon kaj pezon kaj konsumas karbon nemulte. Ĝia kapacito estas pli ol sesoble tiom granda kiom tiu de ordinara vaporturbina generatora kompleto de la sama grandeco.

Malvarmiga sistemo de generatoro estas ŝlosila problemo en ĝia produktado. Nun, en aliaj landoj, oni ĝenerale aplikas aeran aŭ hidrogenan malvarmigon. La efiko de la malvarmiga metodo iniciatita de nia lando egalas al 50 obloj de tiu de aera malvarmigo aŭ 4 obloj de tiu de hidrogena malvarmigo. Tio malfermis tute novan vojon por fabrikado de generatoroj kun granda kapacito.

La sukcesa fabriko de la vaporturbina generatora kompleto trapasis multajn malfacilojn. Ĝi koncentre spegulis la intensan batalon inter la du klasoj kaj du linioj en la industrio de elektraj maŝinoj.

Disvolvante la revolucion spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi sub la direkto de la proletara revolu-

cia linio de Prezidanto Maŭ, la laborista klaso de nia lando sukcesis fabrikii en 1958 la unuan 12,000-kilovatan vaporturbanan generatoran kompleton kun duobla akva interna malvarmigo. Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj lia kompanio provis strangoli tiun ĉi novnas-kiton. En marto de 1966, la laboristoj de la Ŝanhaja Vaporturbina Fabriko proponis plie fabrikii vaporturbanan generatoron kun granda povo, alta temperaturo, alta premo kaj intera revarmigo sur la bazo de atingo en 1958. Liu Ŝaŭki kaj lia kompanio rifuzis la proponon de la laboristoj sub diversaj pretekstoj, kaj pretis importi vaporturbanan generatoran kompleton de la tipo de intera revarmigo el kapitalisma lando, kies prezo estis pluroble pli alta ol tiu fabrikita de nia lando mem.

La ardaj flamoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio ĝisfunde ruinigis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj multe stimulis la aktivecon de la vastaj amasoj de laboristoj. En novembro de 1968, laboristoj en Ŝanhajo komencis provfari 125,000-kilovatan vaporturbanan genera-


toran kompletan kun duobla akva interna malvarmigo. Kun senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ili forte kritikis la kontraŭ-revoluciajn reviziismajn varojn, kiaj “filozofio de sklaveco antaŭ fremdlandanoj”, “rampismo” kaj “unue imiti kaj poste mem fari”, kolportitajn de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj sur la industria fronto. Aplikante la orientilon iri per du kruroj kia kombino de la indiĝenaj kaj modernaj metodoj kaj kombino de la grandaj, mezaj kaj malgrandaj entreprenoj, ili venkis unu malfacilon post alia en tekniko, ekipaĵo kaj materialo, kaj fine sukcesis konstrui tiun grandan vaporturbinan generatoran kompletan kun komplika tekniko.

Dum ĝia fabrikado, sub la gvido de la Partio, armitaj per Maŭzedongpenso kaj disvolvanta la revolucion spiriton “**timi nek malfacilojn nek morton**”, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj dediĉis siajn saĝon kaj fortojn por kiel eble plej frue plenumi la taskon.

Unu el la gravaj konsistigaj partoj de la generatora kompleto estas alttemperatura kaj altprema kaldronego kun vaporpreno de 400 tunoj. La alttemperatura kaj altprema vaporo kiun ĝi produktas estas sendata al la turbino por produkti povon kaj poste retirata por esti revarmigita en la kaldronego antaŭ ol esti resendota plian fojon al la turbino. Tio multe altigas ĝian termikan efikecon. La kaldronego pezas pli ol 1,700 tunojn, inter kiuj estas pli ol 700 tunoj da ŝtaltuboj de variaj grandoj. Du tubkurbigaj maŝinoj — unu granda kaj la alia malgranda — estis bezonataj en fabrikado de tia kaldronego. Sed tiaj maŝinoj tute mankis al nia lando. La revoluciaj laboristoj kuraĝis iri sian propran vojon. Sub la gvido de la veterana laboristo

de la kaldronega fabriko Liu Gintang, nombro da spertaj laboristoj kaj junaj teknikistoj fine elfaris post pli ol 20-tagnokta malfacila luktado malgrandan aŭtomatan likvopreman tubkurbigan maŝinon kun monda progresinta nivelo. Tuj sekve, la veterana laboristo Vu Hincaj kaj lia grupo elfaris ankaŭ grandan tubkurbigan maŝinon. La sukcesa fabrikado de la du ekipaĵoj ne nur metis bazon por elfari la kaldronegon sed ankaŭ plenigis mankon en kaldronfabrikado de tiuj ekipaĵoj de nia lando.

La muntistoj levas kaj fiksas akvomalvarmigan muron al la kaldronego.



Tre granda estis la laborkvanto de veldado por la kaldronego, kiu havas pli ol 30,000 altklasajn alojŝtalajn tubojn de variaj formoj, kaj la kvalito de veldo devas esti tre alta. Speciala speco de altklasa alojŝtala velda vergo devis esti uzata por garantii la kvaliton de la laboro. Tiaj veldaj vergoj estis importataj antaŭ la granda kultura revolucio. La kapitalisma lando produktanta tiajn veldajn vergojn rigore kondiĉis, ke la aĉeto devas esti akompanata per proporcia aĉeto de ŝtalaĵo. En tiu ŝlosila momento la revoluciaj laboristoj de la Ŝanhaja Ĝenerala Fabriko de Elektraĵ Maŝinoj brave prenis sur sin la taskon provfari tiajn vergojn. Ili organizis sturman grupon de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la ĉefa forto kaj partopreno de revoluciaj kadroj kaj teknikistoj. La grupo decidis ellabori sian recepton sur la bazo de uzado de enlande produktataj krudaj materialoj. Post ĉ. 200 eksperimentoj ili fine sukcesis kaj venke solvis la problemon de veldado por kaldronego.

Dum muntado de la kaldronego nombro da grandkalibraj tuboj devis esti ekzamenitaj post ties purigo. La 8-metra tubo kun kurbiĝo de 90 gradoj ne povis esti ekzamenata per rigardo. Se pizogrande sablo estis enlasita en la kurbiĝo de tubo, ĝi kaŭzos seriozan akcidenton, kiam ĝi estos puŝita en la vaporturbinon dum funkciado. Ĉiuj zorgis pri la afero.

“Lasu min rampi en la tubon”, diris komunisto Lu Joŭgen, estro de la laka grupo.

Ekzameni enrampinte en la tubon povis garantii la kvaliton, sed la laboro estis tre peniga. Eĉ homo kun malgranda kresko povis enrampi en la tubon kun kalibro de 404 milimetroj nur post demeto de vestoj.

Spite al rigora frosto, en nura ĉemizo Lu Joŭgen enrampis en la tubon. Atinginte la kurbiĝon, li jam ne povis antaŭenrampi. Pro la frosto de la muroj de la tubo lia tuta korpo sensentiĝis, liaj membroj rigidigis kaj li eĉ ne povis spiri facile. Tiutempe,

recitante parkere en si la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**”, li sentis estiĝon de neelĉerpeblaj fortoj. Kunpremante la dentojn, per granda energio li turnis sian korpon en la tubo... kaj tiel li movis sin antaŭen colon post colo dank’ al sia ruĝa koro fidela al Prezidanto Maŭ kaj forigis ĉiujn sablaĵojn, garantiant la glatan iradon de la konstrua laboro.

Oni uzis nur dek monatojn de provfarado ĝis ekfunkciigo de la generatora kompleto. Tiu ĉi fakto plene montras, ke la laborista klaso de Ĉinio, armita per Maŭzedongpenso, posedas neelĉerpeblan kreivon.

La revoluciaj laboristoj de eksperimenta grupo de la veldverga laborejo provfaras novajn veldvergojn.





Gvidaj kadroj de la fabriko laboras kune kun amasoj.

Penema Spirito en Starigo de Fabriko

LA Gilin-a Olea kaj Grasa Fabriko de nia lando jam pasigis 12 jarojn marŝante sur la vojo de sinapogo sur la propraj fortoj.

Ĝia sidejo estis sovaĝa herbejo en la tempo kiam oni komencis ĝin starigi. Kun penema spirito en sia entreprenado kaj energie strebante por ĝia prospero, komunisto kaj glora armea

invalido Liu Ŝeng kun la laboristoj sub sia gvido konstruis vicon post vico da ruĝbrikaj domoj de la fabriko, havigis al ĝi unun post alia novajn ekipaĵojn kaj rapide disvolvis la malgrandan fabrikon, kiu havis en la komenco nur tri kaldronojn kaj kapablis nur prilabori uzitan oleon, en prosperan socialisman entreprenon, kiu povas produkti dekojn da specoj de lubrikaĵoj.

KONTRIBUI SIAN PARTON POR LA SOCIALISMA KONSTRUADO

En la jaro 1958, la orienta vento de la antaŭensaltego vaste blovis tra la tuta lando. Amasa movado de entreprenado de industrio vigle disvolviĝis en la urbo Gilin.

En oficejo de la partia komitato de Ĉuanjing-kvartalo de Gilin, Liu Ŝeng petis kun emocio, ke la partia organizo permesu lin sinĵeti en la vicon de konstruado. Li diris: "Kvankam mi fariĝis invalido, sed ruĝas mia koro kaj firmas mia volo kaj mi nepre iros ĝisfine la revolucion vojon!"

Tiu batalanto multe suferinta de ekspluatado de bienuloj kaj kapitalistoj en la malnova socio kaj glorie vundita grave en la batalo por rezisti kontraŭ la usonajn agresantojn kaj helpi Koreion decidis fari ankoraŭ pli grandan kontribuon al

la konstruado de socialismo sub la kuraĝigo de la tajdo de la antaŭensaltego.

La revoluciaj kadroj de la kvartala komitato de la Partio varme subtenis la peton de Liu Ŝeng kaj decidis, ke li gvidu popolamasojn starigi kvartalan fabrikon.

Kian fabrikon ili starigu? Liu Ŝeng organizis dekelkajn familianojn de armeanoj kaj revoluciaj martiroj kaj aliajn senokupajn loĝantojn, kaj ili unue faris vizitadon al iuj fabrikoj. Ili vidis, ke oni bezonas oleon por la maŝinoj en la fabrikoj kaj trajnoj kaj aŭtoj; ili vidis ankaŭ, ke multaj fabrikoj havas uzitan oleon. Iuj laboristoj diris al ili, ke oni povas transformi ĝin en uzeblan oleon per prilaboro. Ili diris ĝoje: "Do ni starigu fabrikon por prilabori oleon! Ni transformu uzitan oleon en uzeblan oleon kaj lubriku per ĝi la socialisman radon, por ke ĝi turniĝu pli rapide!"



Jen la laboristdevena teknikisto Tong Ŝuolin (la dua de dekstre) provfaris novan produktaĵon kune kun laboristoj.



Ili mem projektas kaj konstruas fabrikajn domojn.

Sed ili havis nek domon, nek ekipaĵojn, nek kapitalon, nek teknikon. La ŝtato intencis doni helpon al ili, sed pensante, ke la ŝtato devas enmeti kapitalon en ĉiujn aferojn dum la antaŭensaltego, ili preferis venki la malfacilojn per siaj propraj fortoj ol pezigi la ŝarĝon de la ŝtato. Liu Ŝeng diris: "Havante la tri ruĝajn standardojn kiel nian vojmontrilon kaj havante decidemon kaj ĝisĉielan entuziasmon por konstrui socialismon, ni certe povas starigi la fabrikon venkante malfacilojn!" Ili starigis budon el matoj kiel laborejon, aĉetis grandan kaldronon per 25 *yuan* kiujn ili kolektis kiel kapitalon, prunteprenis du aliajn grandajn kaldronojn, alportis uzitan oleon el iu granda fabriko kaj ekbruligis fajron en la forno. Viglaj flamoj lumigis la ridantajn vizaĝojn de Liu Ŝeng kaj la 12 laboristoj. Ili ĉiuj diris emocie: "Ankaŭ ni aldonas hejtlignon al la konstruado de socialismo!"

En la komenco de la starigo de la entrepreno, multajn malfacilojn ili alfrontis. Pro manko de sufiĉaj kapitalo kaj materialo, iam kaj iam ili ne havis prilaboran materialon en la kaldronoj kaj ankaŭ ne lignon aŭ karbon por hejti la fornojn. Sed ju pli multis malfaciloj, des pli firmiĝis ilia volo. Ili diris unuvoĉe: "La fajregon de


la antaŭensaltego ni nepre daŭre bruligos!" Ili alportis faskon post fasko da brullignoj kaj karbon post korbo da karbo de la kuirejoj de siaj hejmoj kaj iris en grandajn fabrikojn por iom post iom kolekti uzitan oleon. Kaj tiamaniere, pli kaj pli prosperiĝis ilia fabriko.

PERSISTADO EN LA ĜUSTA DIREKTO

En printempo de la sekvinta jaro, disvolviĝis la fabriko kaj multiĝis la laboristoj. La grena administracio donis al la olea kaj grasa fabriko taskon de prilaboro de aleŭritoleo. La laboristoj instalas dekkelkajn grandajn kaldronojn kaj komencis prilabori aleŭritoleon por la ŝtato kun arda entuziasmo.

"Eĉ ĉiun guteton de la ŝtata oleo ni devas domaĝi!" Maljuna laboristino Ĝu Juŝu kun la aliaj sub sia gvido inversigis ĉiun el la olebareloj por elfluigi ĉiun guton da oleo kaj elskrapi ole-restaĵon per kuleroj. Dank' al plifortigo de la administrado kaj malaltigo de la konsumata procento, ili elŝparis 20 tunojn da aleŭritoleo en unu jaro.

La 20 tunoj da aleŭritoleo valoras 40,000 *yuan*. Iuj proponis ilin reteni, dum aliaj proponis ilin redoni tute al la ŝtato.



Ĝu Juŝu, unu el la fondintoj de la fabriko, rakontas al nova laboristo la bonan tradicion de "diligenta kaj ŝparema mastrumado de fabriko".

Tiuj, kiuj proponis ilin reteni, diris: "La oleo apartenas al ni mem, do ni ilin retenu por pli-grandigi nian produkton."

Tiuj, kiuj proponis ilin liveri al la ŝtato, argumentis malkonsente: "Ŝparado estas propra devo de ni laboristoj. Nia pligrandigo de la produkto ja estas por la ŝtato, tamen ni devas solvi la malfacilojn per niaj propraj manoj!" Vizaĝe al tiuj du malsamaj opinioj, maljuna laboristino Ĝu Juŝu ĉiam sentis malkvieton en la koro. Ŝi pensis: Nia amata Prezidanto Maŭ nin savis el la fajro de la malnova socio kaj liberigis la virinojn el la dommastrumado en la antaŭensaltego por partopreni la socialisman konstruadon, do ni devas labori tutkore por socialismo. Ŝi diris al la aliaj: "Ni jam fariĝis laboristoj, do ni devas nur aldoni brikojn al socialismo, sed ne etendi manojn al la ŝtato por postulado."

Post la diskuto, ili unuigis siajn opiniojn kaj unuanime decidis liveri la tutan kvanton da oleo al la ŝtato. En iu tute serena tago, longa vico de pli ol 60 ĉaroj portis la oleon al la grenada administracio.

Nelonge post kiam la fabriko fariĝis ŝtata entrepreno en la loko, oni devis konstrui brikan

transformatoran stacion, por kio oni bezonis kelkdek mil *yuan*. Iuj diris: "Nia fabriko apartenas al la ŝtato, do ni sendu petskribon al la supera instanco por akiri de ĝi la bezonatan monon!" Sed firme memorante la instruon de Prezidanto Maŭ pri **sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj**, ili decideme klopodis solvi la problemon per si mem anstataŭ postuli helpon de la ŝtato. Ili kolektis malnovajn brikojn kaj tegolojn el disfalintaj muroj, forlasitaj kamenoj kaj stratanguloj. Sur sovaĝherba kreskejo ili konstruis brikan domon.

En la pasintaj kelkaj jaroj, la olea kaj grasa fabriko jam mem projektis kaj konstruis 16 brikajn domojn el materialoj kolektitaj de ili mem kaj multe renovigis siajn ekipaĵojn.

ELHAKI NOVAN VOJON SINAPOGANTE SUR LA PROPRAJ FORTOJ

Laborante en malgranda fabriko, la laboristoj de la olea kaj grasa fabriko tenas en sia koro la tutan landon, kuraĝe prenas sur sin pezan ŝarĝon por la revolucio kaj ne timas malfacilajn problemojn.

En 1965, nia lando bezonis specon de nesapa alttemperatura lubrikaĵo por iu ekipaĵo. Intencante kateni nin, kapitalismaj landoj fiksis altan koston kaj malfavoregajn kondiĉojn por ĝi. La laboristoj de la fabriko firme decidis elfari tian lubrikaĵon por rompi ilian monopolon pri ĝi.

En la komenco de provfarado, la laboristoj renkontis barojn metitajn de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato Liu Ŝaŭki, pledanta por “administrado de fabrikoj per specialistoj”. Iu t. n. “aŭtoritatulo de lubrikaj graso” asertis, ke oni absolute ne povas elfari tian alttemperaturan lubrikaĵon, se oni ne importas materialon kaj ekipaĵon. Iuj donis al ili fremdlandan literaturon pri produkto de ĝi, por ke ili faru laŭ la sperto de fremduloj, kaj diris al ili, ke ili “bezonos tri jarojn sole por prepari sin al tiu laboro”!

Tiam Liu Ŝeng pensis: Ĉu ni ne povos iri sen fremdlanda apogbastono? Li decidis elhaki sian novan vojon kune kun la laboristoj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.

Teknikisto Tong Ŝuolin, kiu devenis de laboristo kaj lernis en lernejo nur 6 jarojn, prenis sur sin la ĉefan atakan taskon por provfari la lubrikaĵon. Prenante la efektivan staton de nia lando kiel sian starpunkton kaj la aktualajn kondiĉojn de sia fabriko kiel elirpunkton, li serioze analizis fremdlandajn materialojn unu post alia kaj malkaŝis la intrigon de kapitalistoj en intenca misterigo de la produktado de alttemperatura lubrikaĵo por profito kaj tenado de monopola prezo. Li kaj la laboristoj forte kritikis la filozofion de sklaveco antaŭ fremduloj kaj rampismon pleditajn de Liu Ŝaŭki, kaj sin jetis en la batalon de provfarado de alttemperatura lubrikaĵo.

En simple ekipita laboratorio, Tong Ŝuolin gvidis aliajn provprodukti surfaktanton (angle: *surfactant*) bezonatan por produkto de alttemperatura lubrikaĵo. En la eksperimento, produktiĝis ia ekscita gaso, kiu dolorigis la gorĝojn kaj larmigis la okulojn de la laborantoj. Ne havante ventolilon, ili do malfermis la fenestrojn kaj pordon kaj per-

Antaŭ la tri kaldronegoj, kamarado Liu Ŝeng (la tria de dekstre) faras al junaj laboristoj revolucionan tradicion edukon de “sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”.



siste daŭrigis sian laboron spite al frosta malvarmo de 30° C sub nulo.

Per sia senĉesa batalo tra tagoj kaj noktoj la laboristoj de la laborejo por maŝinriparado produktis altprecizajn ekipaĵojn per siaj du malnovaj ordinaraĵ torniloj.

Ili ne havis maŝinon por grajnigi katalizilon. Ili diris: “Tion ni faru per niaj propraj ‘grajngiloj’!” Kaj ĉiuj laboristoj de la fabriko komencis grajnigi per siaj manoj.

Laŭ sia multjara produkta sperto, la teknika grupo de veteranaj laboristoj por solvo de ŝlosilaj problemoj disvolvis sian saĝon kaj elmetis ŝlosilan raciigan proponon, dank’ al kiu oni reduktis naŭ procedojn en kvin kaj ĝisfunde rompis fremdlandan regularon.

La granda orientilo de Prezidanto Maŭ pri **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”** estas ne nur spirita forto por venki malriĉecon kaj postiĝintecon, sed ankaŭ forta ideologia batalilo por batali kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj. Kiam kapitalisma lando ĉantaĝis nin per ĉesigo de provizado de nesapa alttemperatura lubrikaĵo, la olea kaj grasa fabriko sukcese ĝin provproduktis!

En la triumfa kanto de la Granda Proletara Kultura Revolucio, oni faris komparan provadon pri la lubrikaĵo sur du samaj novtipaj maŝinoj en iu frata fabriko. Por unu el ili oni uzis nesapan alttemperaturan lubrikaĵon el kapitalisma lando kaj por la alia la novan produktaĵon de la Gilin-a Olea kaj Grasa Fabriko.

En la unuaj monatoj la maŝinoj iris regule. Pasis kvin monatoj, ses monatoj, la nesapa alttemperatura lubrikaĵo produktita de kapitalisma lando atingis la limon de uzebleco kaj la maŝino devis ĉesi iri; sed la alia maŝino ankoraŭ iris plue en la sepa, oka . . . kaj eĉ en la dekunua monato ĝi ankoraŭ funkciis plue.

Sinapogante sur la propraj fortoj kaj peneme luktante en malfaciloj, la laboristoj de la olea kaj grasa fabriko forigis la malriĉecon kaj blankecon per siaj manoj kaj kreis riĉaĵojn por la socialisma konstruado de la patrolando. Kaj precipe dank’ al la baptado de la batalo en la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili pli vaste kaj pli profunde disvolvis la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, heredis kaj disvolvis la revolucionan spiriton de penema entreprenado kaj ankoraŭ pli rapidigis sian antaŭenmarŝon.

Diversaspecaj lubrikaĵoj atendas transporton por subteni la socialisman konstruadon de la patrolando.



Nova Ŝanĝiĝo de la Elektra Centralo Jangŝupu

LA Elektra Centralo Jangŝupu en Ŝanhajo, kiu situas sur la bordo de Huangpu-rivero, estis konstruita en 1913.

Antaŭ la Liberiĝo, tiu centralo estis instrumento de la usonaj imperiistoj por kruele ekspluati ĉinajn laboristojn. En majo 1949, la Ĉina Popola Liberiga Armeo liberigis Ŝanhajon. Ekde tiam la Elektra Centralo Jangŝupu estas tenata en la mano de la laborista klaso de Ĉinio kaj komencis servi al la socialisma konstruado.

I


Antaŭ 20 jaroj, kiam la usona posedanto de la Elektra Centralo Jangŝupu kune kun sia mastro John Leighton Stuart estis forpelita de la ĉina popolo, li malice diris: "Por ĉinoj, administri tiom grandan centralon simple estas pli malfacile ol trairi kudril-truon por kamelo." Per blokado kaj embargo oni ĉesis liveri dizeloleon al la centralo kun la intenco sufoki ĝian elektran produkton. Sed la ĉina laborista klaso, kiu jam fariĝis mastro de sia lando, brave diris: Ni ne nur povas administri tiun centralon, sed administros ĝin eĉ pli bone! Kiam al la centralo mankis brulaĵo, la laboristoj ekuzis anstataŭe karbon. En malpli ol duon-jaro ili transformis ĉiujn kaldronegojn en hejteblajn per karbo. Ĉion ĉi tion ili faris mem tiel en projektado kiel en muntado, kaj tiel garantiis daŭran produkton de elektro sen interrompo eĉ

de unu sekundo. En la maro de elektraj lampoj brilantaj kiel steloj, Ŝanhajo montras sin pli hela.

Sub inspiro de la instruo de Prezidanto Maŭ "rompi superstiĉon kaj liberigi penson", la laboristoj de la centralo kuraĝe faris reformon al la ekipaĵoj el fremdlando. Ili komencis sian provon sur altprema kaldronego, la ĉefa ekipaĵo de la centralo. Sur la fumtubo je 100 metroj alta troviĝis kovrilo simila al ĉapelo, kiu estis baro por plialtigo de efikeco de la altprema kaldronego. Iuj dubis la kapablon de laboristoj kaj diris: "Ĉu konvenas ĝin forigi? La fremduloj almetis ĝin certe kun ia celo." Sed la laboristoj ne aŭskultis tion. Kelkaj laboristoj surgrimpis la grandan fumtubon kaj demetis la ĉapelon. Post tio la efikeco de la altprema kaldronego tuj leviĝis kaj ankaŭ la elektra konsumo de la centralo mem reduktiĝis multe.

Tiu alta kaj granda altprema kaldronego fabrikita en eksterlando neniam funkciis glate post sia ekfunkcio, kaj la fremdlandanoj uzis 3-4 jarojn por ĝin ripari rompante al si la kapon, sed ne sukcesis. Post ripetada esploro de laboristoj, evidentiĝis, ke la kaŭzo estas liko de iu el ĝiaj ekipaĵoj. Por ripari ĝin necesis frotuma instrumento — malgranda pneŭmatika frotummaŝino, kiu tiam viciĝis inter embargitaj objektoj de imperiismo. Veterana laboristo Giang Lingen diris decideme: "Kion fremdlando povas fabrikii,

Li Venlan (maldekstre), vaporturbina maŝinisto kaj vicsekretario de la partia komitato de la centralo kaj laboristino de la elektroprodukta laborejo estas en laboro.



ankaŭ ni ĉinaj laboristoj povas; kion fremdlando ne povas fabriki, ni ankaŭ fabrikos!" Kune kun siaj kamaradoj, li laboregis tri tagnoktojn kaj sukcesis konstrui per propraj rimedoj malgrandan pneŭmatikan frotummaŝinon. La kvalito de la maŝino multe superis fremdlandajn. La altprema kaldronego estis rapide riparita.

II

La embargo kaj malhelpo de la usona imperiismo ne povis bari la venkajn paŝojn de ĉinaj elektraj laboristoj. Ankaŭ la reviziisma administra linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki kiaj "administraci fabrikon per specialistoj" kaj "sklaveco antaŭ fremduloj", neniel povis deviigi la socialisman direkton de la Elektra Centralo Jangŝupu. La vastaj amasoj de laboristoj marŝas antaŭen en antaŭensaltega rapideco sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La Elektra Centralo Jangŝupu estis konstruita antaŭ kelkdek jaroj, sed en la pasinteco ĝi neniam uzis elektroproduktan ekipaĵon fabrikitan de nia lando. Post la Liberigo, la deziro de laboristoj realiĝis. En 1958, tiu centralo estis ekipita per

tute novaj turbinoj fabrikitaj de nia lando mem, poste la laboristoj plue muntis unu post alia elektroproduktajn ekipaĵojn de nia lando.

Iufoje, oni alportis al la centralo novan ekipaĵon fabrikitan de nia lando kun avangarda nivelo de la mondo. Imitante la tonon de fremdlandaj mastroj, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj reakciaj teknikaj "aŭtoritatuloj" de la centralo diris: "Nun via tekniko ne estas matura, ni timas ke sen fremdlandaj specialistoj vi ne povos munti la ekipaĵon; eĉ se ĝi estos muntita, vi ankaŭ ne povos ĝin funkciigi bone." Sed la elektraj laboristoj, kiuj jam tenas la teknikan potencon, decidis mem munti tiun novan ekipaĵon por glorigi la patrolandon!

En la konstruejo de baza konstruo por la nova ekipaĵo regis arda vigleco, kaj la farado de fosaĵo por fundamento progresis rapide. En eksplodigo, foje kvar prajmoj fariĝis mutaj. Komunisto Tang Julaj sinforĝese iris al la dinamito, aplombe kaj sekure elprenis la prajmojn, rapide forigis la obstrukcon, tiel ke la konstruado glate progresis. Ĉar oni interkruciĝe laboris samtempe sur pluraj etaĝoj, rapide leviĝis metala trabaro alta kiel deketaĝa domo.

Inter la partoj de tiu nova ekipaĵo, la malgrandaj pezis kelkajn tunojn, kaj la grandaj pezis 40-50 tunojn. Por levi tiujn partojn al loko alta je dekoj da metroj, laŭ la maniero de fremdlandanoj, oni unue devas uzi kelkajn monatojn por starigi grandan turarganon. Por ŝpari tempon, la laboristoj faris multajn levstangojn kaj simplajn arganojn. Ili levis unu parton per kelkaj simplaj arganoj, malmuntis grandajn partojn en plurajn malgrandajn pecojn kaj poste muntis ilin supre. Tiamaniere la laboristoj rapide levis pli ol 3,000 tunojn da partoj kaj materialoj, inkluzive de kelkajn grandajn, muntis kaj ekfunkciigis la novan ekipaĵon.

La ekipaĵo de aŭtomata kontrolo estas centra ganglio de la centralo. En la pasinteco la provizo de tia ekipaĵo dependis tute de importo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristoj kritikis la sklavecon antaŭ fremdlandanoj de la

renegato Liu Ŝaŭki, konkeris la malfacilojn de manko de koncerna literaturo, planoj kaj ekipaĵoj kaj fabrikis pintajn produktaĵojn per siaj propraj manoj kaj ilmaŝinoj. Nun, tiu centralo vaste uzas la kontrolajn ekipaĵojn pneŭmatikajn, kiujn ili mem fabrikis, tiel ke multaj ekipaĵoj el la tri-dekaj jaroj mane funkciigataj estis transformitaj en cibernetikajn de la sesdekaj jaroj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la elektra produktkvanto de la Elektra Centralo Jangŝupu altiĝis pli ol 20 procentojn kaj multe superis tiun de la tempo kiam ĝi troviĝis sub kontrolo de la usona imperiismo.

En la lastaj 20 jaroj, sub la direktado de la granda principo de Prezidanto Maŭ “sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”, la laboristoj de tiu centralo rompis fremdlandajn rutinojn, iris propran vojon de industria disvolviĝo kaj akiradis venkojn unu post alia.

Materiisma Dialektiko

Direktis Nin Fari

10,000-tonelan Ŝipon

*Verkita de Laborista Filozofia Studa Grupo de
Hinganga Ŝipkonstruejo de Tiangan*

DANK’ al viva studo kaj viva apliko de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ kaj disvolvante sian revolucion maltimecon de proletaro, la vastaj revoluciaj laboristaj amasoj de nia ŝipkonstruejo sukcesis konstrui 10,000-tonelan ŝipon sur ŝiplito de 5,000-tonela klaso.

La naskiĝo de tiu 10,000-tonela varŝipo pruvis ankoraŭfoje la nerefuteblan veron: “El ĉiuj aferoj en la mondo, homo estas la plej valora. Sub la gvido de la Komunista Partio, se nur estas homo, ĉiaj mirakloj povas esti kreitaj.”

Por konstrui ŝipon necesas ŝiplito kaj kiel granda estas la ŝipo, tiel konforme granda devas esti la ŝiplito. Tio estas regulo ĝenerala. Sed nia ŝipkonstruejo posedas nur ŝipliton de 5,000-tonela klaso. Ĉu eblas konstrui sur ĝi varŝipon 10,000-tonelan?

En la komenco iuj ne havis sufiĉan certecon. Por tiuj burĝaraj “specialistoj” kaj “aŭtoritatuloj” tio estis konsiderata kiel io neimagebla.

Sed la vastaj amasoj de la revoluciaj ŝipkonstruaj laboristoj firme respondis: “Mortaj estas la objektoj, sed vivaj estas homoj. Posedante

materiisman dialektikon de Prezidanto Maŭ kaj plene disvolvante la subjektivan aktivecon, ni certe povas konstrui 10,000-tonelan ŝipon sur ŝiplito de 5,000-tonela klaso". Kiuj ne kredis tion, fakte vidis nur objektojn sed ne homojn, nur la ekzistantajn kondiĉojn, sed ne tiujn en disvolviĝo.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ni serioze studis la grandan penson de Prezidanto Maŭ pri **"sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj"**, forte kritikis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, kaj decidis disvolvi la ŝipkonstruan industrion multe, rapide, bone kaj ekonomie, apogante nin sur la propraj fortoj. Ni laboristaro havas tian ambicion kaj ankaŭ tian kapablon. Tio estis la ĉefa faktoro en la konstruado de 10,000-tonela varŝipo.

Unuavide estis malfacileco en la objektivaj materiaj kondiĉoj por la tasko. La ŝiplito de 5,000-tonela klaso havas "efikan" longecon de 117 metroj, "efikan" larĝecon de 17 metroj kaj "efikan" portkapablecon de 2,400 tunoj, sed 10,000-tonela ŝipo estos kun longeco de almenaŭ 140 metroj, larĝeco de pli ol 18 metroj kaj pezo de pli ol 3,000 tunoj. La pezo de la hulo superis portkapablecon de la lito je proksimume mil tunoj. Se tiu demando ne estus solvita, konstruo de 10,000-tonela ŝipo restus malplena vorto.

Por solvi la problemon de supersarĝo ni analizis la ŝipliton: Pro la pli peza hulo de la ŝipo ĉiu apogpunkto de la lito devas porti pli grandan ŝarĝon. Se ni plimultigos la apogpunktojn, la tuta ŝarĝo estos dividita inter ili kaj la problemo

La 10,000-tonela ŝipo "Tiangin"



estos solvita. Tiel ni reformis la portajn kondiĉojn de la ŝiplito per pliigo de lignaj apogiloj, por ke ĉiu aparta apogpunkto ne portu tro grandan pezon. Por preventi deformiĝon de la ŝiplito, ni plifortigis la bazon de ĝia pli forte surpezata areo per altpreme enŝprucigita betono. La praktiko montris, ke la objektivaj kondiĉoj povas esti ŝanĝitaj, se oni nur plene disvolvas la homan subjektivan aktivecon.

Por konstrui 10,000-tonelan ŝipon sur ŝiplito de 5,000-tonela klaso la projekto devas esti farita laŭ la karaktero de la lito. Ceterne necesas grandaj ekipaĵoj. Tamen ni havis nek bluplanon nek tiajn ekipaĵojn. Tiuj malfavoraj faktoroj ŝajne metis nin en pasivecon. Sed Prezidanto Maŭ diris: **“La flanko en malsupereco kaj pasiveco povas kapti al si la iniciativon kaj venkon el la manoj de la flanko en supereco kaj iniciativo post akiro de certaj kondiĉoj dank’ al aktivado de subjektiva kapablo laŭ la efektivaj cirkonstancoj.”**

Ni laboristoj riĉaj je praktika sperto plej bone konas la karakteron de la 5,000-tonela ŝiplito. Se ni nur science resumos la praktikan sperton, ni certe povos ellabori praktikeblan projekton por konstrui 10,000-tonelan ŝipon sur la lito. Tiel ni organizis projektan grupon de “triflanka kombiniĝo” kun laboristoj kiel la ĉefa forto kaj partopreno de revoluciaj gvidantaj kadroj kaj teknikistoj. Ĉiu laborspeca fako sendis siajn spertajn veteranajn laboristojn al la grupo por partopreni ĝian laboron. Tiel laboristoj de ĉiu laborspeco povis bone koni la tutan laborplanon kaj sian propran taskon en ĝi. Tio rompis la malnovan rutinon, ke la “specialistoj” faras la projektadon, dum la laboristoj sole plenumas la laboron. La laborista klaso montris sian saĝon kaj talenton per kolektiva cerbumado kaj klopodado. Rezulte la tasko de projektado estis plenumita en nur pli ol du monatoj, por kiu burĝaraj “specialistoj” kaj “aŭtoritatuloj” bezonis antaŭe unu aŭ du jarojn. Kaj la plenumata labordesegno de la hulo kaj kalkulo de la bezonataj materialoj por la tuta ŝipo estis faritaj ankaŭ en tre mallonga tempo.

Por konstrui la ŝipon oni devis uzi rutine arganon de pli ol 75 tunoj, sed tian ni posedis nur de 40 tunoj. Ĝenerale, hulo de 10,000-tonela ŝipo estas konstruata en 50-60 partoj. Por levi tiajn partojn nia argano tute ne kapablas. Do en la tuto ni estis en malsupereco. Sed, ni faris la hulon en 100 partoj proksimume, tiel por instali ĉiun tian parton per tiu argano ni trovis nin en absoluta

supereco. Dank’ al tio sukcesa plenumo de la tasko de muntado estis garantiita. La helico, kiu havas diametron de pli ol kvin metroj kun pezo de 13.5 tunoj, estas grava ekipaĵo de la ŝipo. Por prilabori tiun muldaĵon oni bezonas grandan vertikalan tornomaŝinon. Sed ni havis nur alezmaŝinon kun malgranda tranĉiltenilo kun diametro de nur 20 centimetroj. Tamen ni sukcesis prilabori per ĝi la helicon. Dank’ al saĝo kaj klopodado, la 10,000-tonela ŝipo iom post iom formiĝis sur la lito de 5,000-tonela klaso.

La lanĉo de ŝipo estas alia grava problemo, precipe ĉe la kazo ke 10,000-tonela ŝipo lanĉiĝas de ŝiplito de 5,000-tonela klaso, kiu havas malpli grandan portkapablon. Antaŭ lanĉo ĉiuj lignaj apogiloj devas esti forigitaj, tiel ke la tuta pezo de hulo falos sur la du glitvojojn kaj reaperos la problemo de superŝarĝo. Kion fari, se la ŝipo ne forglitis, kiam la glithaltigilo estos formovita? Tia afero ne estis senprecedenca en la ŝipkonstrua historio.

Kiel preventi tion?


Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“En farado de iu ajn afero, se oni ne konas ĝiajn cirkonstancojn, ĝian naturon kaj ĝiajn rilatojn kun aliaj aferoj, oni ja ne konas la leĝojn ĝin regantajn, ne scias kiel agi, kaj ne sukcesos ĝin bone fari.”** Laŭ praktika sperto oni scias ke materia korpo donas malpli da premforto suben dum momento aŭ moviĝo ol dum longa tempo aŭ senmoveco. Por garantii forglitigon de la 10,000-tonela ŝipo sur akvon en plej mallonga tempo, necesis koncentri la fortojn por ekkoni la leĝojn de glitado kaj solvi la problemon de forglitigo.


Laŭ la vidpunkto de materiisma dialektiko, la leĝoj de ĉiuj aferoj estas ekkoneblaj, inkluzive tiujn de glitigo de 10,000-tonela ŝipo. Ni faris ripetadan eksperimenton kaj ekkonis la leĝojn de glito de 10,000-tonela ŝipo dum surakviĝo. Ni trovis plej bonan recepton de lubrikaĵo kaj alprenis serion da rimedoj, kiaj plilongigo de glita vojo, plifortigo de antaŭaj subteniloj, plilongigo de la tempo de flosado de la poŭpo k. a. kaj tiel garantiis sukcesan surakvigon de la ŝipo.

“Materio povas transformiĝi en spiriton kaj spirito povas transformiĝi en materion.” Ni laboristaro kun la ĉiamvenka Maŭzedongpenso povas disvolvi nian senfinan forton el la granda batalo de reformo de la objektiva mondo por krei ĉiam pli multan riĉaĵon por nia socialisma patrolando.

Energie Subteni la Agrikulturon por Batalakiri Novan Agrikulturan Riĉrikolton

Laboristoj de la Dongfanghong-a Traktora Fabriko de Luojang survaganigas siajn produktitajn traktorojn por subteni la agrikulturan produkton.






Laboristoj de la agrikultura maŝinfabrika de Jelin-komunumo de Lingŝuj-gubernio de Hajnan-insulo riparas agrikulturilojn por komunumanoj, profundiĝinte en kamparon.



Vendistoj de komerca kooperativo de Ginhi-gubernio de Liaŭning-provinco vektportas varokorbojn al kamparo por sendi al komunumanoj malgrandajn agrikulturilojn kaj ĝustatempe subteni printempan produkton.

La maŝinfabrika de Tanghe-gubernio, Henan-provinco, sukcesis fari draŝan kaj tranĉan maŝinon "tipo 45", kiu povas draŝi grenajn plantojn kaj tranĉi fojnon.





La Guanghi-a Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj sendas laboristojn al kamparo por kontroli kaj ripari agrikulturilojn por komunumanoj.

La revoluciaj laboristoj de la Kantona Kemisterka Fabriko produktas grandan kvanton da kemisterko por subteni la agrikulturan produkton.



Kilijing-komunumo Akiris Abundan Rikolton en Greno kaj Kotonon

SURBAZE de la duobla venko en revolucio kaj produktado en la pasintaj tri sinsekvaj jaroj, Kilijing-komunumo de Hinhiang-gubernio, Henan-provinco, iam persone inspektita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kreis en la pasinta jaro rekordon en produktokvanto de greno kaj kotonon. La meznombra pomua produktokvanto de sensemigita kotonon de la 31,000 muoj da kotonon de la tuta komunumo atingis 67.5 kilogramojn, t. e. 30% pli multe ol tiu de 1968. En la “ruĝflaga eksperimenta kampo” inspektita de Prezidanto Maŭ, aperis parcelo kun alta pomua produktokvanto de 175 kilogramoj. La meznombra pomua produktokvanto de la 50,000 muoj da grenkampoj atingis 340 kilogramojn. En la pasinta jaro, la tuta komunumo liveris al la ŝtato 1,500 tunojn da greno kaj 2,050 tunojn da sensemigita kotonon kaj multe superplenumis la produktan taskon de greno kaj kotonon difinitan de la ŝtato.

Kilijing-komunumo situas sur la norda bordo de la Flava Rivero kaj estas grava produktejo de kotonon. En la jaro 1965, la pomua produktokvanto de sensemigita kotonon de tiu loko jam superis 50 kilogramojn, sed tiu de greno estis relative malalta.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, alte tenante la grandan standardon de revolucia kritikado, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj forte kritikis la kontraŭrevolucion reviziisman nigran varon de la renegato Liu Ŝaŭki, plipaŝe akcelis la ideologian revoluciigon kaj antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la grenprodukto.

La plialtiĝo de la produkto de greno kaj kotonon de Kilijing-komunumo altiris atenton de la proksimaj komunumoj kaj produktaj brigadoj, pli kaj pli multiĝis vizitantoj al ĝi por lernado kaj pli kaj pli multiĝis laŭdoj pri ĝi. En tia situacio, en la kapoj de parto de la kadroj kaj komunumanoj aperis la penso, ke “la revolucio jam venis al la fino kaj ilia produkto jam atingis la kulminon”. Ili opiniis, ke jam “sufiĉas” por ili, ke la produktokvanto estas alta, ilia kontribuo estas granda kaj ilia vivo estas bona.

Ĉu ankoraŭ ebla estas pliprodukto de greno kaj kotonon de Kilijing-komunumo? Ĉu oni povas fari pli grandajn kontribuojn al la ŝtato? Por solvi tiun problemon, la revolucia komitato de la komunumo ripetfoje studis la instruon de Prezidanto Maŭ “... la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn. Vidpunktoj de stagno, pesimismo, inertece kaj memkontento estas tute eraraj”, serioze resumis la sperton en tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto kaj ĉiuj opiniis unuanime, ke la penso “sufiĉas” estas obstaklo al daŭra revoluciado. Tiu penso spegulas, ke kelkaj vidas nur ĝis la pinto de sia nazo, sed ne la tutan aferon de la sepcentmiliono nombra popolo de la lando. Post la profundigo de sia kono pri la afero, ili tuj levis novan altan tajdon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en la tuta komunumo. Post la studado, ili profunde komprenis, ke por ili ne estas “sufiĉas”, sed ili multe postrestigis en sia efektivigo de la instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj en komparo kun Daĝaj. Estas vere, ke “rigardante malantaŭen, oni trovas sin progresinta; sed rigardante antaŭen, oni trovas sin

devanta kuregi". Ili decidis tuj klopodi por pli alta produkto kaj kuratingi la antaŭirantojn.

Dank' al la senĉesa altigo de la konscio de la vastaj amasoj de kadroj kaj komunumanoj pri daŭra revoluciado, ili venkis naturajn katastrofojn en la pasintaj jaroj kaj akiris novajn venkojn.


En printempo, kiam reverdiĝis tritiko, frosta aerfluo atakis ilian lokon. La kadroj de diversaj niveloj batalis tage kaj nokte kune kun la vastaj amasoj, irigaciis kaj sterkis, kaj zorge flegadis kaj tiel garantiis riĉan rikolton de tritiko.

Kiam proksimiĝis la tempo por printempa semado, Kilijing-komunumo suferis de longa senpluveco kaj oni ne povis semi kotonon. Kun la montotranslokiga spirito de la Malsaĝa Avo, la vastaj amasoj de komunumanoj portis humidan


grundon de malaltaj kampoj en la koton-kampojn, kaj zorge semis la kotonsemojn en la dismetitan humidan grundon, kaj tiamaniere plenumis la taskon de kotonsemado. En la mezo de julio, kiam la kotonplantoj komencis frukti, subite ilin atakis hajlo. La verdaj kotonarbetoj estis senfoliigitaj. Se tio okazus en la pasinteco, oni tuj replugus la kampojn por semi malfruan grenon. Sed ĉifoje, la membroj de Kilijing-komunumo armitaj per Maŭzedongpenso ne deprimiĝis nek malkuraĝiĝis. Ili sterkis kaj plugetis ĉiujn kotonkampojn trafitaĵn de katastrofo. Post kelkaj tagoj, denove aperis burĝonoj sur la branĉoj de la kotonplantoj. Tiamaniere, la komunumanoj venkis la sinsekvajn malfacilojn kaj akiris pli grandan riĉrikolton.

La tuta membraro de Kilijing-komunumo iam persone inspektita de Prezidanto Maŭ firme decidis marŝi plue en venko sur la vasta socialisma vojo.

Komunumanoj de Kilijing-komunumo aktive vendas al la ŝtato sian produktitan kotonon.



Argĉntaj Montetoj apud Lazura Maro



EN sudokcidenta parto de Hajnan-insulo troviĝas fame konata salproduktejo en nia lando, nome: Jinggehaj-salfarejo. Ĝia areo ampleksas pli ol 3,800 hektarojn. En 1958 la jaro de antaŭensaltego, sub la direkto de la principo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”** kaj sub la lumigo de la ĝenerala linio **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**, la vastaj amasoj de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj komencis konstrui novtipan modernan salfarejon.

La marregiono de Jinggehaj estas unu el la plej salecaj en la mondo. Ĝi entenas salon je 3.5%, tio estas unu el avantaĝaj kondiĉoj por entrepreni salfaradon. Ĉi tie, antaŭe estis vasta ŝlima marĉo kovrata de sovaĝaj herboj kaj fragmitoj, kie vagis serpentoj kaj skorpioj. La klimato estas varma; eĉ la temperaturo de januaro, la malplej varma monato en la jaro, superas 20 gradojn, tial akvo vaporigas tre rapide. Ĉi tie, en 1942, la japanaj imperiistoj entreprenis salfaradon kaj fanfaronis ke ĝi estos “la plej granda salfarejo en la orienta Azio”. Tamen, ili malsukcesis en sia entreprenado, post foso de nur unu tajdoenkonduka kanalo. Post la kapitulaco de Japanio

“komisiito” de la kuomintanga reakciularo parade faris rondrigardon super la loko en aeroplano. Sed, post enpoŝigo de kelkaj sumoj de “startaj elspezoj” ili faris nenion alian krom tian ridindan konkludon: “Ekspluatado de malproksima lim-regiono estas ekstreme malfacila. Neniu volas iri tien, sen granda kompenso.”

Sed la batalantoj de Jinggehaj-salfarejo finkonstruis la salfarejon en nur malpli ol tri jaroj.

En la komenco de 1958, responde al la alvoko de la Centra Komitato de la Partio kaj la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, 5,400 eksoficiraj kaj ekssoldatoj de PLA venis el diversaj lokoj al la konstruejo. Apenaŭ komenciĝis la konstruo, ili jam alfrontis malfacilan provon. Laŭ la origina projekto por konstrui tiom grandan salfarejon estas bezonataj 13,000 ĝis 15,000 laborantoj, 50 ĝis 70 pezaj konstrumaŝinoj, kaj tempo de tri jaroj. Sed tiam la tuta personaro, inkluzive la laboranto-lokanojn, nombris nur malpli ol 7,000 homojn, krome, tute mankis mekanika ekipaĵo. Kion fari?

Malfaciloj neniel povis timigi la batalantojn armitajn per Maŭzedongpenso. Ili elmetis la sloganon “esti herooj en milito kaj modeloj en konstruo”. Ne havante buldozon, ili ekfosis teron per pioĉoj kaj forportis ĝin per vektoj; ne-

havante rulpreman maŝinon, ili anstataŭe tiris rulpremilojn per si mem aŭ bovoj; ne havante elektron, ili lumigis per gaslampoj kaj torĉoj; kiam portempe ne sufiĉis provizo de transportiloj, ili iris en montojn, hakis bambuojn kaj arbojn kaj mem faris vektojn kaj korbojn. Tiamaniere, en du kaj duono da jaroj la batalantoj elfosis 11,560,000 kubmetrojn da tero, kiuj sufiĉas por konstrui digon 3 metrojn larĝan kaj 5 metrojn altan ĉirkaŭe de Hajnan-insulo.

La malfaciloj estis venkitaj de la batalantoj. Jinggehaj fine prezentis sian longjare kaŝitan trezoron — arĝentan kristalan salon.


La dezerteco antaŭ dekkelkaj jaroj jam tute malaperis. Laŭ la digo longa pli ol 50 kilometrojn ombras verdaj arboj. Ekster la digo, lazuras la maro; interne de la digo estas nombro kaj nombro da ebenaj vaporigejoj kaj kristaligejoj borderitaj

per kanaletoj. Tie, sub la trembrilanta akvo kristaliĝas neĝblanka saltavolo.

En la salfarejo oni aplikas la progresintan metodon de vaporigo de marakvo en fluado. Kiam la marakvo enfluas tra la elektra akvobarilo, ĝi komencas sian daŭran fluadon laŭplane en la primarajn vaporigejoj unue, kaj poste laŭvice en la duavicajn kaj triavicajn. Kun la senĉesa fluado pli kaj pli densiĝas la salakvo. Kiam ĝi venas al la kristaligejoj, ĝi jam troviĝas en stato de saturiĝo. En tiu tempo, iom post iom aperas sur la akvosurfaco blankaj “flosantaj floroj”. Nelonge poste, ili komencas kristaliĝi en salerojn kiuj poste disvolviĝas en saltavolojn.

Por utiligi la neelĉerpeblan marakvon, la vastaj amasoj de oficistoj kaj laboristoj de la salfarejo faris grandajn kvantojn da laboro dum pli ol dek jaroj. Nun, ili dividis la kristaligan regionon

Monto de salo



kun pli ol 400 hektaroj en 12 unuojn. Ĉiu unuo enhavas pli ol 300 kristaligejojn. Tra sep fervojoj en la salfarejo la salo amasigita en arĝentaj montetoj estas senĉese transportata al diversaj lokoj por subteni la socialisman konstruadon en la lando.

En ĉiu unuo estas rezervujoj kaj konservujoj por salakvo. En rezervujoj estas saturita salakvo por provizi laŭbezzone la kristaligejojn, dum la konservujoj estas destinitaj por konservi la salakvon el kristaligejoj, okaze de malbona vetero. Post kiam la meteorologia stacio antaŭinformas pri pluvo, en 3 aŭ 4 horoj la salakvo sur la areo de pli ol 2,000 hektaroj povas esti koncentrita en la respektivajn konservujojn. Tio estas moderna ekipaĵo por salfarejo.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, dank' al forta kritikado fare de la vastaj amasoj de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la salfarejo kontraŭ la "sklaveco antaŭ fremdlandanoj", "rampismo", "administrado de fabriko per specialistoj" k. a. kontraŭrevoluciaj reviziismaj absurdaĵoj de la granda renegato Liu Ŝaŭki, aperis nova alta tajdo en la revolucio kaj produkto. En la tri jaroj de la granda kultura revolucio, la meznombra jara produktokvanto de salo je 1.6-oblo plimultiĝis kompare kun la plej alta jara produktokvanto antaŭ la granda kultura revolucio. En 1969, la plana produktokvanto de Jinggehaĵ-salfarejo estis 170,000 tunoj da salo, sed ĝis la fino de novembro, ĝi jam produktis 244,000 tunojn, kaj per tio faris novan kontribuon al la ŝtato.

Modelo de Revoluciaj Junuloj

— Pri kamarado Gin Hjunhua, kiu brave oferis sian vivon por
savi ŝtatan posedaĵon

JEN MING

KAMARADO Gin Hjunhua antaŭe estis mezlernejano en Ŝanhajo. Kun la brava volo defendi kaj konstrui landliman regionon li volonte venis al Suanghe-brigado de Hjunhe-komunumo de Hjunke-gubernio, Hejlonggiang-provinco por tie fikse loĝadi kaj partopreni agrikulturan produktan laboron. Por savi ŝtatan posedaĵon li heroe oferis sian vivon en batalo kontraŭ eksterordinare granda diluvo. Li realigis sian ŝtalan ĵuron "Se nur mi vivas, mi plenforte laboras kaj dediĉas mian vivon al Prezidanto Maŭ".

Kamarado Gin Hjunhua naskiĝis en laborista familio kaj kreskis en la epoko de Maŭ Zedong. En la jaro 1969 li atingis la aĝon de 20 jaroj. Malgranda Gin estis juna ruĝgvardiano hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

En majo de 1966, kiam la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone ekbruligis fajron de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj centmilionia revolucia popolamaso leviĝis por kritiki la kontraŭrevolucion "Trifamilian Vilaĝon", li brave

sin ĵetis en la batalon de la amasa kritiko strikte sekvante la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ.

Kiam la ruĝaj gvardianoj faris vastan interkon-takton por interŝanĝi revolucion sperton, Ĝin Hjunhua alvenis al Ŝaŭŝan kaj kun respekto vizitis la lokon, de kie leviĝis la ruĝa suno, kaj li ricevis en Pekino revuon de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj feliĉe vidis la tagnokte sopi-ratan Prezidanton Maŭ. Tiam li solene faris ĵuron: “Ho, Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Via ruĝa gvardiano por ĉiam venke marŝos antaŭen strikte sekvante vin!”

Kiam leviĝis la ŝtormo de la “januara revolucio”, li kaj la proletaraj revoluciuloj deprenis potencon de la plenmano da enpartiaj poten-te-
nantoj irantaj la kapitalisman vojon en Ŝanhajo. En la intensa granda batalo inter la du klasoj, la du vojoj kaj la du linioj, li ĉiam staris firme sur la flanko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj faris kontribuon por firmigi la revolucion grandan unuiĝon kaj defendi la revolucion triflan-kan kombiniĝon.

En la praktika batalo li ekkonis la veron: “Fideli al Prezidanto Maŭ signifas forton, kaj strikte sekvi Prezidanton Maŭ signifas venkon.”

En la fino de marto, 1969, la Ŝanhaja Revolucia Komitato organizis grupon de intelektaj junuloj iri al Hejlonggiang por lernado kaj vizitado, kaj Malgranda Ĝin partoprenis tiun grupon. Vidante la fekundan teron kaj senfinan stepon en la landlima regiono, Malgranda Ĝin kun brava sentimento diris al siaj kamaradoj: “Tiel vasta tero estas ankoraŭ ne kulturata, kiom la limregionaj malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj bezonas grandan nombron da intelektaj junuloj por konstrui kune kun ili la landliman regionon pli bela kaj pli prospera. La tero de nia patrolando estas tiel fekunda kaj bela, ni neniel permesos al la social-imperiismo okupi eĉ unu colon de nia tero!”

Malgranda Ĝin faris decidon kontribui en defendado kaj konstruado de landlima regiono.

Reveninte al Ŝanhajo post la vizito, Ĝin Hjunhua sin ĵetis en la streĉan laboron de propagando kaj mobilizo.

Je la 25-a de majo, Ĝin Hjunhua kaj nombro da ŝanhajaj intelektaj gejunuloj ekveturis al Hej-

longgiang por tie fikse loĝi kaj partopreni agrikulturan produktan laboron.

Ĝin Hjunhua venis kaj aliĝis al Ŝuanghe-bri-gado de Hjunke-gubernio. Li ne demandis pri kondiĉoj de manĝo kaj loĝo, sed demandis, kiuj estas malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkam-paranoj, kiuj estas familianoj de PLA-anoj aŭ revoluciaj martiroj, kiuj estas senlaborkapablaj kaj vivas sub la helpo de kolektivo, kaj kiuj estas bienuloj aŭ kulakoj. Li volis klare diferencigi la malamikojn de amikoj, trovi por si bonajn instruistojn kaj diligente servi al la popolo. Kvankam li ofte portis akvon kaj dispecigis brul-lignojn por familianoj de PLA-anoj kaj senla-borkapablaj komunumanoj, tamen li ĉiam bedaŭ-ris ke li ne povas fari pli multe por ili. Li ofte vizitis la emeritan laboriston Avo Vang, kiu estis jam 67-jara kaj kuŝis paraliza sur sia terlito, por lin prizorgi. Avo Vang kortuŝite diris: “Mal-granda Ĝin, kiu estis mezlernejano en urbego, ne havas la manieron de intelektuloj. Li ja estas bona junulo de la epoko de Maŭ Zedong!”

Iuj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkam-paranoj traktis Malgrandan Ĝin kompare ĝentile. El tio li konsciis, ke li ankoraŭ ne komplete kombi-niĝis kun la amasoj, kaj sincere petis opiniojn pri si de la brigadaj kadroj kaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj dirante: “Ni venis tien ĉi por akcepti vian reedukon. Vi estas niaj plej bonaj instruistoj. Kiam vi rimarkos niajn mankojn, bonvolu senĝene montri al ni, kaj doni rigoran kritikon. Ne hezitu en tio pensante pri ĝentileco, sed agu laŭ Maŭzedongpenso.” Li meminiacie vizitis malriĉkampanojn kaj malsu-perajn mezkampanojn por libere elverŝi sian koron kaj akcepti konscie ilian reedukon.


Iun vesperon, en kabano de kelkaj intelektaj gejunuloj sidis ĉirkaŭ kerosena lampo, kaj Mal-granda Ĝin gvidis la lernadon kun *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* en la manoj. Iuj plendis, ke la lumo de kerosena lampo estas duonhela, lego sub tia lumo difektos la okulojn; aliaj diris, ke ĉe kerosena lampo laodoro pikas la gorĝon kaj la fumo nigrigas la naztruojn. Malgranda Ĝin diris: “Kiel ajn hela estas la lampo, tamen, ni sentas la lampon malhela, se malhela estas nia penso; kiel ajn maldika estas la meĉo, tamen, ni sentas la lampon tre hela, se ni studas verkojn de Prezidanto Maŭ. Ĉar Maŭzedongpenso prilumas por ni la direkton de antaŭenmarŝo.” Li persistis vive studi kaj vive apliki verkojn de Prezi-

danto Maŭ sub kerosena lampo kaj fari notojn pri batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo. Kvankam liaj naztruoj estis fumajitaj kaj liaj okuloj estis lacigitaj, tamen lia koro ĉiam estis plene hela sub la lumo de Maŭzedongpenso.

Nelonge post lia alveno, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj instruis al Malgranda Gin garbigi pajlon. Kun granda fervoro li eklaboris. Pro malatento lia mano estis sange pikita, kaj doloris al li, tamen vidante ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj timas nek pikon nek froton, li spite al doloro daŭrigis la laboron. En la vespero li studis sub kerosena lampo la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Se vi volas esti komprenata de la amaso kaj kunfandiĝi kun ĝi, vi devas fari decidon trapasi longan kaj eĉ doloran procezon de remuldatao.”** El tio li komprenis ke la timo al piko dum la garbigado de pajlo montris ke en lia penso estas sindorlotemo kaj liaj penso kaj sento ankoraŭ longe distancas de tiuj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li decidis sin hardi longdaŭre en fizika laboro. Iufoje, li garbigis tritikon post falĉmaŝino tirata de ĉevaloj kaj liaj vestoj tramalsekiĝis de ŝvito pro la laciga laboro. Iu aĝa malriĉkamparano konsilis lin iom ripozi, sed li firme rifuzis, dirante: **“Kiam pli multe ŝvitas la korpo, malpli iĝas sindorlotemo en la penso.”** Kiam iu demandis, ĉu li timas penadon, li respondis: **“La Ruĝa Armeo timis nek malfacilojn nek danĝerojn kaj faris la Longan Marŝon de 25,000 lioj, sekvante Prezidanton Maŭ. Ankaŭ ni timas nek malfacilojn nek morton kaj decideme iras la vojon montritan de Prezidanto Maŭ por sinkombino kun laboristoj kaj kamparanoj.”**

Kamarado Gin Hjunhua — ruĝgvardiano de Prezidanto Maŭ kaj modelo por la revolucia junularo

Gin Hjunhua ĉiam rigore ekzamenis sian agon laŭ jenaj postuloj: **“Ĉe ĉiu ago pensu, ĉu ĝi konformas al la bezono de la popolo; ĉe ĉiu vorto pensu, ĉu ĝi akordiĝas kun Maŭzedongpenso; ĉe ĉiu paŝo pensu, ĉu ĝi estas farata sur la revolucia**



linio de Prezidanto Maŭ.” Kaj li brave marŝis antaŭen laŭ la vojo de daŭra revolucio montrita de Prezidanto Maŭ.

En aprilo 1969, publikiĝis la nova statuto de la Partio aprobita de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio kaj la penso de Prezidanto Maŭ pri partia konstruo penetris en la koron de Malgranda Gin. Li volis kiel eble plej rapide hardi sin en firman komunisman batalanton. Li prezentis al la partia filio petskribon por aliĝi al la Partio kaj skribis en sia taglibro jenon: “Ho Partio, ho Partio! Mi via ruĝa gvardiano vin sekvos ĉiam strikte! Mi klopodos remuldi mian mondkoncepton en la vasta tereno de kamparo, por ke mi povu pli frue aliĝi al la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio en ideologio kaj organizo, strikte sekvu la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj brave batalu dum la tuta vivo por realigi komunismon en la tuta mondo!”

En la vespero de la 14-a de aŭgusto, sub kerosena lampo Gin Hjunhua faris noton en sia taglibro, la lastan en sia vivo: “... la revolucia junularo en la epoko de Maŭ Zedong ne toleras ofendon. Se la usona imperiismo kaj la social-imperiismo aŭdacas provi nian forton, ni do regalos ilin per la feraj pugnoj de la tria kaj kvara generacioj de la socialisma Ĉinio!”

Je la 15-a de aŭgusto, montaraj torentoj kuris malsupren kaj la riveroj inundis la teron, ambaŭborde de Hjunhe kaj Ĝanhe estiĝis maro.

Je la kvara horo posttagmeze, kiam Gin Hjunhua riparigis digojn kontraŭ la superakvo kune kun milicanoj, la estro de produkta grupo kamarado Giang subite alkuris kaj diris al la milica rotestro kamarado Gia: “150 elektrostangoj sur bordo enakviĝis kaj povas esti forportotaj de la superakvo...”

“Estas grave protekti la elektrostangojn, donu tiun taskon al mi!” Antaŭ ol la grupestro Giang finis sian parolon, Gin Hjunhua jam prezentis sian peton al la milica rotestro. La rotestro ordonis lin gvidi kvin milicanojn por plenumi la urĝan taskon.

Apenaŭ alkurinte al la bordo, li vidis ke du elektrostangoj estas jam forportitaj de la torento. Tiam la riverakvo fluis malsupren kun sekunda

rapideco de 7-8 metroj, kaj la stangoj estis puŝitaj antaŭen kiel pafjetitaj sagoj. Kun brula maltrankvilo Gin Hjunhua antaŭen kuris, demetante siajn vestojn, kaj la unua saltis en la riveron.

“La fluo estas tro rapida, estas danĝere en la akvo!” Admonis lin iu surborde. Malgranda Gin laŭtvoĉe respondis: “**Ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo!**”

Malgranda Gin luktis kontraŭ la torento. Unu ondego puŝegis lin en akvokirlon, sed li elmergis sian kapon el la akvo kaj sturmis al la stangoj. Alia ondego ree puŝegis lin en akvokirlon, sed li denove elmergis sian kapon kaj daŭre sturmis al la stangoj. ...

Antaŭen, antaŭen, kapti la stangon ja signifas venkon! Malgranda Gin jam distancis de la stango nur unu metron. Ĝuste en tiu tempo unu monta torento impetis muĝante en la riveron kaj englutis lin. ...

Tiel kamarado Gin Hjunhua oferis sian vivon heroe. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ŝuanghe-brigado tre malĝojis pro la perdo de tia intimo kaj aliflanke fieris pro apero de tia juna heroo **timanta nek malfacilojn nek morton**, kreskinta sub la nutrado de Maŭzedong-penso.

Dum sia vivo, Malgranda Gin plurfoje prezentis al la partia filio sian peton por fariĝi proletara avangarda batalanto. Nun post diskuto ĉiuj membroj de la partia filio de Ŝuanghe-brigado opiniis, ke Gin Hjunhua devenis de laborista familio, senlime amis Prezidanton Maŭ, diligente studis kaj aplikis vive verkojn de Prezidanto Maŭ, aktive akceptis reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj ĉiam la unua elpaŝis por batali kontraŭ malfaciloj, pene ŝargis sin per pli pezaj revoluciaj taskoj, servis al la popolo kaj surgrimpis la altan pinton de ideologia revoluciigo. Li jam atingis la normon de komunisma batalanto. La kerna grupo de Hjunke-gubernio de la Komunista Partio de Ĉinio sankciis la decidon akcepti kamaradon Gin Hjunhua post lia morto kiel membron de la Komunista Partio de Ĉinio.

Verkoj de Maŭ Zedong

(en Esperanto)

**(Parto de la Broŝure Eldonitaj Verkoj
en la Periodo 1945-1949)**

La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito	36 pĝ.
Pri la Ĉongking-a Intertraktado	40
Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong	22
La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj	52
Pri Kelkaj Gravaj Problemoj en la Nuntempa Politiko de la Partio	20
Parolado en Konferenco de Kadroj en la Ŝanhi-Sujjuan-a Liberigita Regiono	32
Pri Plifortigo de la Sistemo de Partia Komitato	20
Daŭrigu la Revolucion ĝis la Fino	32
Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio	38
Pri Popol-demokratia Diktaturo	32
Komentarioj pri la Blanka Libro	70

14.5 × 9.5 cm.

**Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libro servo de la Ĉina Esperanto-Ligo,
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

Subtera Kanaleta

EN Nanĝaj-brigado ĉe piedo de Erling-monto en la sudokcidento de Hebej-provinco sin trovas subtera kanaleta. Ĝi estas 662 metrojn longa, 1.8 metrojn alta kaj larĝa kaj tegita per ŝtonoj. Tiu kanaleta estas tunelo fosita sub la tero je 24 metroj. Oni konstruis pumpan stacion ĉe ĝia fino. Kiam oni ŝaltas elektran kurenton, la kanaleta akvo tuj estas levata supren por irigacii pli ol 1,800 muojn da kampoj sur la monto kaj montdeklivoj.

Tiun subteran kanaletan konstruis la komunumanoj de Nanĝaj-brigado en la Granda Proletara Kultura Revolucio, sinapogante sur la propraj fortoj kaj peneme luktante duonjaron.

Nanĝaj-brigado estis fama pro la sekeco de siaj agroj, kiuj plejparte troviĝas sur montdeklivoj norde de la vilaĝo. Kvankam ekster la vilaĝo estas kanalo, sed ĝia akvonivelo estas malalta kaj ne eblas konduki la akvon al kampoj sur la monto. Tial la produkta kvanto de greno en tiu brigado estis malalta. La komunumanoj aspiris transformi la sekajn kampojn en akvajn por akiri riĉan rikolton kaj subteni la socialisman konstruadon.

En la vintro de 1965, la revoluciaj kadroj kaj amasoj de la brigado jam planis fosi subteran kanaletan por konduki la akvon al la monto kaj irigacii la sekajn kampojn. Sed tuj ĉe la komenco de la laboro ili jam estis malhelpitaj de la agentoj de la granda renegato Liu Ŝaŭki en la loka akvo-utiliga institucio. La lastaj diris: “Vi havas nek teknikon, nek ekipaĵon, nek monon; entreprenado de tiel granda konstruo portos al vi nenion krom malŝparo de laborforto kaj mono.” Tiamaniere, antaŭ ol tri ŝaktoj estis finfositaj, la tuta laboro ĉesis.

La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ levis la konscion de la revoluciaj kadroj kaj komunumanoj de Nanĝaj-brigado pri klasa batalo kaj batalo inter la du linioj. La 67-jara malriĉkampano Vang Hejhiaŭ diris: “Ĉu kamparanoj ricevas grenon de aŭ liveras ĝin al la ŝtato, tio ja

estas granda problemo. Ni malriĉkampanoj kaj malsuperaĵ mezkampanoj nepre devas fari nian kontribuon al la ŝtato!”

La vortoj de Vang Hejhiaŭ manifestis elkoran volon de la komunumanoj de Nanĝaj-brigado. Ili decidis konstrui la subteran kanaletan por akiri agrikulturan riĉrikolton.

En decembro 1968, pli ol 300 heroaj komunumanoj de la brigado venis al la konstruejo de la subtera kanaleta kun alta batala entuziasmo, alte tenante ruĝajn flagojn.

Por produkta brigado, konstrui kanaletan longan je pli ol 600 metroj kaj subteran je pli ol 20 metroj ja estas granda afero. Iuj proponis peti de la superaĵ instancoj helpon per teknikistoj kaj ekipaĵoj. Sed la malriĉkampanoj kaj malsuperaĵ mezkampanoj firme diris: “Por venki malfacilojn kaj transformi la naturon ni devas nin apogi sur la propraj fortoj, sed absolute ne trudi al la ŝtato ŝarĝon!”

Sub inspiro de la brila instrukcio de Prezidanto Maŭ “sinapogi sur propraj fortoj”, la du “indiĝenaj specialistoj” Vang Hejhiaŭ kaj Giaŭ Huangmaŭ faris skizan planon en sep tagnoktoj. Por konformigi la projekton al la realo, Vang Hejhiaŭ ankoraŭ faris “indiĝenan modelon”. Kiam la konstruo komenciĝis, ili tagnokte batalis sur la konstruejo kune kun la amasoj. Sen teodolito, ili anstataŭe uzis ortilon de lignajisto kaj faris mezuradon parton post parto; sen nivelilo, ili anstataŭe uzis bovlon kaj pelvon kun akvo por niveli la fundon de la kanaleta. Ili konkeris la teknikajn malfacilojn unun post alia kaj garantiis ke sendevie kuniĝis ĉiuj partoj de la tunelo.

Dum la ĉiam pli rapida disvolviĝo de la konstruo, sinsekve aperis malfaciloj. Sed, ju pli grandaj estis la malfaciloj, des pli firmiĝis la batalvolo de la komunumanoj. Antaŭvespere de la lastjara printempa festo, furioza neĝblovo daŭris kvar tagnoktojn, ankaŭ la komunumanoj laboris kvar tagnoktojn en neĝado. Iufoje, la plafonaj rokoj

Kemisterkaj Fabriketoj Stariĝis en Ĉiuj Antaŭurboj de Ŝanhajo

EN la antaŭurboj de Ŝanhajo stariĝis nombro da kemisterkaj fabriketoj servantaj al la agrokulturo. La fabrikoj estas malgrandaj, rapide konstruitaj per malmulta investo, sed ludas rimarkindan rolon kaj estas tre bonvenigitaj de la komunumanoj. Oni nomas ilin kemisterkaj fabriketoj.

Tiuj fabriketoj estis starigitaj en la jaro 1959 de ŝanhajaj laboristoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭ la orientilo elmetita de Prezidanto Maŭ pri samtempa starigo de grandaj entreprenoj kaj mezgrandaj kaj mal-

grandaj entreprenoj kaj subteno de industrio al agrokulturo, kun la revolucia spirito kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi. Por ili oni aplikis novan produktan procedaron originalan de nia lando. Tiuj procedaro estas pli simpla ol la malnova kaj bezonas malpli da ekipaĵoj. Dank' al ĝia apliko, multe reduktiĝis la konsumo de materialo kaj movforto, sed plimultiĝis la specoj de kemisterkoj pli rapide efikaj kaj nemalutilaj al la grundo kaj malaltiĝis la produktokosto. Tial, kemisterkaj fabriketoj havas gravan signifon por garantii riĉan rikolton en agrokulturo kaj akceli ĝian modernigon.

de la tunelo malfirmiĝis, necesis almeti lignajn tabulojn kaj stangojn por subteni ilin. Tio estas danĝera laboro. La estro de la kvina produkta grupo Gaŭ Guĝu kaj la milicanoj Gaŭ Ŝuanling kaj Giaŭ Zanghi sturmis tien, kune laŭtkriante: **“faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**. De la supro senĉese falis ŝtonoj. En la danĝera momento, Gaŭ Guĝu pensis ne pri sia danĝero sed sekureco de la klasaj fratoj. Kriante **“Ŝtonoj falas!”**, li rapide forpuŝis retroe per unu mano Ŝuanling kaj per la alia Zanghi, sed antaŭ ol li mem povis retroiri, granda ŝtono jam falis sur lin. Post lia vundiĝo, malriĉkamparano Giaŭ Hilu kaj la juna milicano Giaŭ Ergan tuj transprenis lian

taskon kaj gvidis la aliajn daŭrigi la batalon kaj venkis la akcidenton, tiel ke la konstruo daŭre iris glate.

La 18-a de junio 1968 estis festa tago por Nanĝaj-brigado. Tiun tagon, la subtera kanaletoj komencis funkcii en triumfo. Vidante ke la akvo levita el ĝi fluis al la surteraj kanaletoj kaj al ŝtuparaj kampoj, la komunumanoj emocie ĝojkriis: **“Vivu Prezidanto Maŭ!”**

La aŭtunaj plantoj, kiuj kreskis depende de la naturo de la antikva tempo en Nanĝaj-brigado, lastjare donis senprecedencan riĉan rikolton. Kun ĝojo la komunumanoj vendis al la ŝtato pli ol 70,000 kg. da superflua greno.

Antaŭ la starigo de la fabriketoj en la ĉirkaŭurbo de Ŝanhajo, la kemisterko tie uzata estis tute liverita de la ŝtato. Pro tio, ke la transporta distanco estas longa kaj la aplikado devas esti tre akurata, la kemia sterko bezonata de la agrokulturo en la antaŭurboj ofte ne povis esti ĝustatempe alportita kaj sekve oni ne povis efektiviigi pliprodukton.

Kiam la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la antaŭurboj de Ŝanhajo urĝe postulis rapide ŝanĝi tiun postigiŝtecon de la provizo de kemisterko kompare kun la granda disvolviĝo de agrokulturo, la orientilo de Prezidanto Maŭ pri samtempa starigo de grandaj entreprenoj kaj mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj kaj pri subteno de industrio al agrokulturo venis inter la laboristojn kaj malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Ili estis kuraĝigitaj kaj tre ĝojiĝis. Ili decidis starigi kemisterkajn fabriketojn en ĉiuj gubernioj de la antaŭurboj de Ŝanhajo. En praktikado, la vastaj amasoj de laboristoj, revoluciaj teknikistoj kaj revoluciaj kadroj faris senŝanceliĝan batalon kontraŭ la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la industria branĉo de kemia sterko, rompis la limigojn porpledatajn de ili, kia la aserto ke en nitrogensterka industrio, "oni povas nur funkciigi grandajn fabrikojn, sed ne malgrandajn", kaj energie starigis kemisterkajn fabriketojn. Kvankam la laboristoj neniam faris ekipaĵojn por produkto de kemia sterko, sed ili ne estis timigitaj de la malfaciloj en produktado de nitrogena sterko, kiaj "alta temperaturo, alta premo, brulemo kaj eksplodememo", kies karakterizaĵojn energie distrupepetis la reakciaj teknikaj "aŭtoritatuloj". Ili kuraĝis praktiki kaj krei novon kaj senĉese akiris novajn sukcesojn. La laboristoj de la kemisterka fabriketo de Giading-gubernio de Ŝanhajo organizis specialan teknikan grupon por rapide funkciigi la fabriketon. Utiligante uzeblajn partojn de eluzitaj malnovaj kunpremioj, la grupo faris novan kunpremilon kun novaj partoj fabrikitaj de la grupanoj post unumonata klopodo. Dank' al tio ili ŝparis por la ŝtato kelkdek mil *yuan* kaj ĝustatempe donis subtenon al la agrokulturo. Laboristoj de la kemisterka fabriketo de Pudong-gubernio reformis la sintezan turon, kiun misterrigis burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj", ŝparante iujn partojn de ĝi, reformante ĝiajn aliajn partojn laŭ la lokaj kondiĉoj kaj uzante ordinarajn materialojn loke produktitajn kiel surogatojn en iuj ekipaĵoj, kaj tiamaniere ŝparis ŝtalaĵojn por la ŝtato kaj plialtigis la produktokvanton de kemia sterko je 1.5-oblo.

Per siaj fortoj kaj saĝo, la vastaj amasoj de laboristoj ne nur starigis kemisterkajn fabriketojn, sed ankaŭ venkis diversajn malfacilojn aperintajn en projekto de la procedaro, irado de la maŝinoj kaj tekniko de manipulado post ilia ekfunkcio, pro tio ke "novaj estas la teknologio, ekipaĵoj kaj laboristoj" en tiuj fabriketoj. Por garantii la regulan produktadon de la fabriketoj, laboristoj de multaj maŝinkonstruaj fabrikoj organizis riparajn taĉmentojn por helpi la kemisterkajn fabriketojn en reformo kaj renovigo de la ekipaĵoj, loĝante en ili. Por renovigi la gasigan manieron, laboristoj de iu kemisterka fabriketo faris pli ol 70 eksperimentojn kaj finfine "obeigis" la gasgeneratoron kaj altigis ĝian gasigan povon je unu oblo. Dank' al senĉesa klopodado de la laboristoj, senĉese altigis la tekniko kaj produkto de ĉiuj fabrikoj. Nun, la meznombra tutjara produktokvanto de sinteza amonio de la 11 kemisterkaj fabriketoj en la antaŭurboj de Ŝanhajo jam altigis de 800 tunoj laŭ la origina projekto ĝis 5,000 tunoj, kaj tiu de iuj fabrikoj jam altigis ĝis proksimume 7,000 tunoj. Ilia totala jarproduktokvanto de kemia sterko jam okupas 42 procentojn de la konsumata kvanto de kemia sterko en ĉiuj antaŭurboj de Ŝanhajo kaj la proviza kvanto de kemia sterko pligrandiĝis 2.5-oble ol tiu antaŭ la starigo de tiuj fabriketoj.

La fabriketoj povas aranĝi sian produktadon laŭ la lokaj aktualaj bezonoj kaj ĝustatempe provizitajn, kion la plantoj bezonas. Ili pliiĝis la specojn de produktaĵoj kaj malaltigis la produktokoston agrokulturan. Ekzemple, en somero rizplantoj bezonas amoniakan akvon, la kemisterkaj fabriketoj do grandkvante produktas amoniakan akvon; en aŭtuno kotonplantoj bezonas solidan kemisterkon, la kemisterkaj fabriketoj do produktas tian sterkon. La efiko de amoniaka akvo estas rapida kaj krome ĝia produktokosto estas pli malalta je ĉ. du trionoj en komparo kun amonia sulfato. Cetere, la produktaĵoj de la fabriketoj estas konsumataj ĉe la proksimaj lokoj, tial oni povas ŝpari multe da transporta pago.

Ĉar la Granda Proletara Kultura Revolucio stimulis la socialisman aktivecon de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj samtempe la dek gubernioj en la ŝanhajaj antaŭurboj ĉiuj persistas en bona funkciigo de la fabriketoj, la agrokulturo en la antaŭurboj estas multe akcelita. En la jaro 1969, la rikolto de greno de Ŝanhajo kreis la plej altan rekordon en ĝia historio.

Malgranda Kemisterka Fabriko



Laboristoj kolektas opiniojn pri ilia produktaĵo sur kampoj rekte de komunumanoj.



Malgranda Ke-
misterka Fabri-
ko en kamparo



Laboristoj sin-
okupas pri tek-
nika renovigo.



Ekzameno de produktaĵo en laboratorio de la fabriko

Angulo de ĝia laborejo



多产化肥支援农业

四海翻腾云水怒 五洲震荡风雷激



Kemia sterko en transportado al kamparo

Akcepti Reedukon kaj Remuldi la Malnovan Ideologion

FININTE mian studon en supera lernejo en septembro de 1963, mi estis postenigita al iu elektrocentralo ĉe landlimo de la Patrio, kaj laboris tie jam pli ol 6 jarojn. En tiuj jaroj, mi okupiĝis kune kun laboristoj pri revolucio, produktado kaj teknika renovigo, ricevante reedukon de la laborista klaso kaj remuldante mian malnovan ideologion.


En la komenco post mia veno al la centralo, mi partoprenis fizikan laboron. Por mi, kiu kreskis en kamparo kaj komencis fari fizikan laboron jam de knabeco, fizika laboro tute estis nenio. Tial, en la centralo mi volontis fari ĉian malpuran aŭ pezan laboron. En duopa ŝultroportado de ligno mi ĉiam elektis la pli dikan finon; en portado de cemento mi ĉiufoje surŝultrigis du sakojn. Post kelka tempo mi fariĝis sunbruna kaj kreskis al mi forto. Iuj laboristoj diris, ke mi laboras kiel

“bovo”, kaj eknomis min Granda Guo. Kaj mi pensis en mi, ke mi kiel studento jam sufiĉe bone kombiniĝis kun laboristoj kaj jam trapasis la provon de fizika laboro.

Sed la afero montriĝis ne tiel, kiel mi pensis. Foje, mi kaj iu laboristo varmigis grandan parton de dinamo je pli ol cent tunoj pezan. La varmiga forno similis al granda ĉambro, en kiu la varmo fontis de elektro. Laŭ postulo la temperaturo devas superi 200 gradojn C. Sed kiam ĝi leviĝis ĝis 190 gradoj, subite rompiĝis elektra drato en la forno. La veterana laboristo, kiu laboris kune kun mi, tuj surmetis vatitan veston kaj elektroveldajn gantojn kaj rampis en la fornon. Sub lia edifo, mi tuj sekvis lian ekzemplon. La varmiga ĉambro tiel nin bakis, ke akre doloris al ni la gorĝo, kvankam ni portis plurajn respiratorojn. Kiam ni ektenis la elektran draton, la ledgantoj simple

Kamarado Guo Ĝiji (fronte la kvara de maldekstre) studas ŝlosilan problemon en produkto kune kun laboristoj.





*Kamarado Guo Ĝiji (fron-
te la dua de maldekstre),
kiu sukcese faris liberan
linian laboron sub ultra-
tensio de 260,000 voltoj,
kaj liaj kunbatalantoj*

ŝvitis per oleo. Sed sub la kuraĝigo de la granda instruo de Prezidanto Maŭ **“faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, ni rapide splisis la draton. Kiam ni elrampis el la varmiga forno, niaj vatitaj vestoj kaj brovoj jam bruldifektiĝis de varmego.

Post la afero, mi determinis la distancon inter mi kaj la laboristo en ideologio. Mi trovis, ke apenaŭ la laboristo rimarkis la rompiĝon de la elektra drato, li tuj kuraĝe enrampis la ĉambron sen ajna hezito, kvankam li bone sciis la malfacilon kaj danĝeron en ĝi. Kaj mi? Mi sekvis lin nur post kiam li donis al mi ekzemplon. Kvankam mi enrampis nur je unu paŝo post la laboristo, tamen ĝuste la distanco de tiu paŝo montris, ke li havas la spiriton tutkore servi al la revolucio, dum mi egoismon en la fundo de mia animo.

Dank’ al partopreno de fizika laboro dum la tempo, mi profunde komprenis, ke por intelektuloj fizika laboro ne celas doni al ili laboristan aspekton, sed postulas ilin ĝisfunde remuldi sian malnovan ideologion kaj starigi mondkoncepton de senrezerva kaj komplete servo al la revolucio.

Por plenumi la grandan strategian principon de Prezidanto Maŭ **“sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”** kaj akomodigi al la disvolviĝo de situacio de la revolucio, nia centralo komencis apliki la novan teknikon **“linia laboro je tensio”**.

Linia laboro je tensio estas fari riparadon ĉe alttensia linio aŭ alttensia ekipaĵo portanta kurenton. Posedante tian teknikon oni povas ŝpari iujn rezervajn ekipaĵojn, kiujn oni ordinare bezonis, kaj tiel ŝpari grandan nombron da monrimedoj por la socialisma konstruado.

Linia laboro je tensio estas progresinta tekniko en la mondo. Ĉirilate la elektraj laboristoj de nia lando jam delonge malfermis novan vojon en la sfero de konduklinio. Sed en la pasinteco katenate de la “sklaveco antaŭ fremdlandanoj” kaj “rampismo” de la granda renegato Liu Ŝaŭki, la laboristoj ne povis disvolvi ĉi tiun novan teknikon en nia centralo, tiel ke ni ne havis ŝancon bone praktiki ĝin. En la Granda Proletara Kultura Revolucio ni kritikis la “sklavecon antaŭ fremdlandanoj” kaj “rampismon” kaj komencis praktiki en nia centralo tiun novan teknikon. Sed, pri la objekto de linia laboro je tensio kiun ni la unuan fojon entreprenos ni nenion aŭdis en la lando. Mi denove konsultis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ diris: **“Ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi paŝon post paŝo post la aliaj.”** Tiel mi firmigis mian decidon surgrimpi la pinton de scienco kaj tekniko de la mondo por gajni gloron al Prezidanto Maŭ. Mi do petis laboristojn lasi min plenumi tiun ĉi taskon.

Post sufiĉa preparo, sub gardo de kelkaj veteranaj laboristoj, aplikante la metodon de egalpotenciala linia laboro mi la unua venis al ekipaĵo kun 250,000-volta kurento kaj baldaŭ forigis la perturbon.

Dank’ al la provo mi profunde spertis, ke la kaŭzo de la fakto, ke mi povis kuraĝe iri la unua sur 250,000-voltan ekipaĵon ne kuŝis en tio, ke mi estas lerta en tekniko, sed en tio, ke mi akiris neelĉerpeblan forton el Maŭzedongpenso, levis mian politikan konscion sub la reeduko de la laborista klaso.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ cetere instruas al ni, ke **“la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn”**. Sekvante tiun grandan instruon kaj disvolvante la spiriton de daŭra revoluciado, ni plie provis en nia centralo aplikon de pli progresinta tekniko de libera linia laboro je tensio. Mi kaj laboristoj studis kun la alfrontataj problemoj koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ. Mi faris decidon



Kamarado Guo Ĝiji (fronte la tria de maldekstre) laboras kune kun laboristoj.

dediĉi ĉion mian al la revolucio same kiel la laboristoj. La eksperimento de libera linia laboro je tensio enhavas grandan danĝeron. Unue, la tensio altas je 260,000 voltoj; due, la leĝoj de distribuo de voltaro sur eksperimentaj instrumentoj ne estis plene konataj. Sed, surbaze de la sperto de linia laboro je tensio en la pasinteco kaj post ĉiufanka scienca analizo, ni ekposedis sufiĉajn sciencajn pruvojn. Mi pensis, ke pro bezono de sinpreparo kontraŭ milito kaj por ekstermi imperiismon, reviziismon kaj reakciulojn, ni ne devas halti duonvoje sed daŭre marŝi antaŭen. Kaj mi denove la unua min anoncis por fari la eksperimenton de libera linia laboro je tensio de 260,000 voltoj.

Antaŭvespere de la eksperimento la laboristo kaj mi kune studis la “tri popularajn artikolojn”. Foje kaj refoje aperis antaŭ mi la altaj figuroj de Gang Side, Norman Bethune kaj Malsaga Avo. Mi ne povis trankviliĝi, kiam mi pensis en mi: Morgaŭ mi kune kun la laboristoj venkos elektron por surgrimpigi la pinton de scienco kaj tekniko. La sekvintan matenon mi surmetis la laborveston, kiun mi portis dum la aŭdienco donita de Prezidanto Maŭ al ni okaze de naciifesta revuo, fiksitis surbruste ore brilantan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ, kaj la unua venis al la eksperimenta loko kaj tie atendis la komencon de la eksperimento.

Kiam ĉio estis en ordo, komenciĝis la eksperimento. Laŭ la ordono de la komandanto mi kuraĝe grimpis supren kaj proksimiĝis al la altensia linio. Rimarkinte tiutempe mian ekscitiĝon la veterana laboristo, kiu min gardis, diris: “Haltu, Granda Guo!” Kaj sub lia iniciato, li kaj mi kune studis la vortojn de Prezidanto Maŭ: “Tio kion ni bezonas, estas entuziasma sed trankvila spiritstato kaj intensa sed bonorda laboro.” Post tio mi tuj firme respondis en la alta aero: “Mi firme plenumos la plej altan instrukcion!” Tiamaniere, post superrego de mia emocio, kun decido kaj kuraĝo venki ĉiujn malfacilojn, mi proksimiĝis al la ultratensia fadeno de 260,000 voltoj kaj ektenis ĝin per la mano. La elektro estis venkita de ni revoluciaj batalantoj armitaj per Maŭzedongpenso.

En praktiko, mi profunde komprenis el persona sperto, ke se intelektuloj edukitaj de malnovaj lernejoj volas bone progresi, ili devas sincere kaj elkore akcepti la reedukon de la laborista klaso, ĝisfunde remuldi sian malnovan ideologion, sensanceliĝe iri la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj; nur tiamaniere, ili povos fariĝi intelektuloj bonvenaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Hi Ĵujhua post Reveno al la Hejmloko

KAMARADINO Hi Ĵujhua estis antaŭe esploristo-praktikanto de la Entomologia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. En aŭgusto de 1962, responde al la granda alvoko de la Partio energie disvolvi agrikulturon kaj subteni la plejfronton de agrikulturo, ŝi revenis al sia hejmloko en Diaŭĝuangzi-brigado de Gianming-popolkomunumo, Zunhua-gubernio, Hebej-provinco por

partopreni kampajn laborojn, kaj tiel surpaŝis la vojon de kombiniĝo kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaĵ mezkamparanoj.

Nelonge post sia reveno, maljuna malriĉkamparano Song Vanfa diris al ŝi elkore: “Ĵujhua, vi estas ido de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaĵ mezkamparanoj kaj vizitis lernejon plurajn jarojn. Vi devas bone servi al la malriĉkamparanoj kaj

malsuperaj mezkampanoj!” Tiam pensis en si Hi Ĵujhua: En la malnova socio, mia familio plurgeneracie suferis ekspluatadon de bienuloj kaj kulakoj, vivante kiel brutoj, eĉ neniu el miaj familianoj estis legscia. Nur post la Liberiĝo kaj sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, mi infano de malriĉulo fariĝis nun juna intelektulo. Respondante la alvokon de la Partio, mi nepre faros mian kontribuon al la agrikultura fronto.

En oktobro de tiu jaro, ŝi partoprenis la kunvenon por celebri la dekan datrevenon de agrikultura kolektivigo okazigitan de la komunumo. En la kunveno kamarado Vang Guofan, estro de la komunumo, rakontis pri la historio, kiel riĉiĝis la komunumo transformiĝinta el la kooperativo kun 23 familioj de malriĉkampanoj, kiuj strikte sekvis la kolektivigan vojon montritan de Prezidanto Maŭ. El lia parolado ŝi ricevis tre profundan edukon kaj pli firmigis sian decidemon lerni de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, iri la revolucion vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj dediĉi sian tutan vivon al la kamparo.

El la agroj de Diaŭguangzi-brigado pli ol duono estas malaltaj kampoj kun stagnanta akvo. Tre serioza estis la damaĝo kaŭzita de talpogriloj kaj aliaj malutilaj vermoj. Ĉiujare, ili manĝis plantidojn en printempo, tiel ke ofte aperis vaklokoj sur la bedoj, kaj en aŭtuno antaŭ ol maturiĝo la plantoj jam falis aŭ kliniĝis pro atakoj de la vermoj kaj insektoj. La rikolto estis serioze detruata. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj diris al Hi Ĵujhua: “La malutilaj vermoj kaj insektoj estas granda minaco al la agrikulturo de nia vilaĝo. Vi havas sciencajn sciojn. Se vi sukcesos forigi ilin, ni povos akiri bonajn rikoltojn.”

La vortoj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj estis unuflanke kuraĝigo kaj aliflanke stimulo al Ĵujhua. Ŝi dubis, ĉu ŝi povos plenumi la taskon, kvankam ŝi iom studis entomologion, tamen, neniam praktike ekstermis insektojn. Sed pensante pri la espero, kiun soife metas sur ŝin la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, ŝi decidis ĵeti flanken ĉiujn egoismajn konsiderojn kaj dediĉi sian tutan koron al la afero. En la fino de la jaro 1962, sub la gvido de la partia filio, 13 junaj intelektuloj en Diaŭguangzi-brigado revenintaj de urboj organiziĝis en agronomian eksperimentan grupon. Kaj Hi Ĵujhua fariĝis la grupestro.

En printempo de 1963, komenciĝis la laboroj de ekstermo de talpogriloj, blankaj vermoj kaj aliaj malutilaj insektoj. La junuloj ellernis pli ol 40 insektmortigajn metodojn. En libroj estas rekomendita la metodo de mortigo de talpogriloj per venenigita greno kiel rimedo tre efika. Sed, kial ĝi ne donis rezulton en Diaŭguangzi-brigado, kiu ĉiujare ĝin aplikis? Hi Ĵujhua kaj la grupanoj faris vastan enketadon, modeste petis konsilojn ĉe malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, resumis spertojn kaj instruojn kaj fine trovis metodon por ekstermi talpogrilojn koncentrinte la spertojn de la amaso. En tiu jaro, unuafoje en la tuta malalta agraro de pli ol 400 muoj de la brigado, oni sukcesis kreskigi plene plantidojn.

Post tio la eksperimenta grupo komencis ekstermi malutilajn insektojn sur la tero. La ĉefa malutila insekto estis maiza piralido, kiu plimultiĝas tre rapide kaj konstante kaŭzis damaĝon ĉiloke. En la komenco oni ne bone sukcesis pro manko de kono pri la leĝo de la vivo de la nomita insekto. Por deradike forigi la malutilon de tiu insekto, la grupo decidis mem fari detalan observadon kaj eksperimentadon kaj trovi la leĝojn de generado kaj kreskado de la maiza piralido kaj metodon de ekstermado. Hi Ĵujhua bredis en la korto de sia loĝejo multajn maizajn piralidojn por observi iliajn generadon kaj kreskadon. Cetere ŝi elektis tri observajn punktojn en parceloj kun malsamaj kondiĉoj. Dum somero, post reveno de kamplaboroj la unua afero por ŝi estis observi la insektojn antaŭ ol trovi tempon por preni manĝon. Post tagmanĝo, kiam la komunumanoj ripozis sub ombro de arboj, ŝi iris en maizan kampon sub la brulanta suno por observi la staton de maizaj piralidoj. De somero ĝis aŭtuno ŝi kaj la aliaj membroj de la eksperimenta grupo diligente laboris pli ol kvin monatojn ofte forgesante manĝon kaj dormon, kaj fine trovis la tempon de eloviĝo kaj la vivleĝo de la maiza piralido en la loko. De 1964, ĉiujare ĝustatempe aplikante necesajn rimedojn por ekstermi ĝin, oni fundamente povas efike limigi ĝian malutilon.

De kelkaj jaroj, Hi Ĵujhua kaj ŝia eksperimenta grupo cetere enkondukis kaj elkulturis 22 bonajn speciojn de greno kaj kotono por la brigado kaj per tio garantias ĉiujaran kreskon de la produktkvanto de greno. Tiu agronomia eksperimenta grupo estis kvalifikita kiel progresinta unuo tiel de la subprovinco kiel de la provinco. Kaj Hi Ĵujhua glorie ĉeestis kongresojn de aktivuloj de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kunvokitaj respektive de la gubernio, subprovinco kaj provinco.

Lernejo sub Administrado de

Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj

Mezkamparanoj

EN la vasta kamparo de nia lando, depost kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj komencis administri la lernejojn, ili kreis multajn bonajn rimedojn kaj spertojn en sia praktikado kaj faris kontribuojn por la proletara eduka revolucio. Tie ĉi ni raportu al vi, kiel administras lernejon sub la gvido de la Partio la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Juziŝan-brigado de Ŝandongĝuang-komunumo de Pinggu-gubernio, Pekino.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Juziŝan-brigado komencis adminis-

tri lernejon jam en la jaro 1965. Tiam firme efektigante la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ “koncerne al funkciigo de lernejoj fare de komunumo kaj brigado, oni devas permesi tion fari al tiuj, kiuj havas necesajn kondiĉojn”, kaj post intensa batalo kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, tiu brigado starigis mezlernejon por kulturi daŭrigantojn de la proletara revolucia afero laŭ la volo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

La sekretario de la ĝenerala partia filio de la brigado kaj ĉefkomitatano de la brigada revolu-

En la klasĉambro





La sekretario de la ĝenerala partia filio de la brigado kamarado Vang Gingong (dekstre la dua) kaj la reprezentantoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj interkonsiliĝas pri la lerneja administrado.

cia komitato Vang Gingong diris: “Prezidanto Maŭ fidas nin kaj donis al ni la rajton administri lernejon, ni nepre devas bone teni la edukan potencon en niaj manoj, agi laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ kaj funkciigi lernejon laŭ la bezonoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.”

Ĉiuj gravaj aferoj de la lernejo, kiaj la politika kaj ideologia laboro al la instruistoj kaj lernantoj, akcepto de lernantoj, diplomiĝo de lernantoj, aranĝo de lernoprogramo, transpostenigo de instruistoj, komenco de nova semestro aŭ libertempo k. t. p., ĉiuj devas esti diskutataj kaj deciditaj de la gvida grupo de la brigado.

Por likvidi la venenan influon de la granda renegato Liu Ŝaŭki, kia “lerni por esti estro”, la gvida grupo de la brigado mobilizis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj la revoluciajn instruistojn kaj lernantojn disvolvi amasan revolucion kritikadon. La sekretario de la ĝenerala partia filio de la brigado Vang Gingong persone faris raporton al la instruistoj kaj lernantoj por kuraĝigi ilin diligente studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, lerni kulturajn kaj sciencajn sciojn kaj starigi en si la penson lerni por la revolucio.

La kadroj kaj vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de ĉiuj produktaj grupoj aktive partoprenas la administradon de la lernejo, ĉefe zorgas pri la eksterlerneja eduko, kaj precipe dum la ĉesigo de lecionoj por fari someran kaj aŭtunan rikoltojn en la okupoplenaj periodoj, ili organizas la lernantojn, ke ili aktive partoprenu kolektivan produktan laboron tage kaj okazigu kunvenon por interŝanĝo de spertoj en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ aŭ disvolvu la amasan revolucion kritikadon nokte, por altigi la politikan konscion de la lernantoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj forte tenas ankaŭ la ĉiutagan edukadon al la lernantoj. Kiam estiĝas problemoj, la brigado aranĝas studrondon de Maŭzedongpensoj kun partopreno de reprezentantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, lernantoj kaj iliaj familioj. Ĝin ĉeestas ankaŭ kamaradoj el la gvidaj grupoj de la brigado kaj lernejo kaj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpensojn kaj batalas kontraŭ egoismo kaj kritikis reviziismon kune kun ili. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: Zorgante samtempe edukadon en kaj ekster la lernejo, ni certe povas bone eduki la lernantojn.

La gvida grupo de Juziŝan-brigado opinias, ke por kulturi revoluciajn daŭrigantojn en la lernejo, tute revolucia instruistaro estas necesa, tial ili alte taksas la gravecon de elektado kaj kulturado de instruistoj. Por plifortigi la instruistaron, la sekretario de la ĝenerala partia filio de la brigado decidis asigni al la lernejo la estron de la unua produkta grupo Vang Baŭcang kiel instruiston. Vang Baŭcang estas filo de malriĉkamparano, iam lernis en mezlernejo kaj post kelkjara hardado en fizika laboro estis elektita de la amasoj kiel estro de produkta grupo. Tian instruiston la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ja povas fidi. En la lastaj jaroj, la brigado sendis al la lernejo komitatanon de la ĝenerala partia filio de la brigado, sekretarion de la partia filio de iu produkta grupo kaj brigadan estrinon por virinaj aferoj kiel instruistojn. Nun, en la instruistaro jam formiĝis forta spino. Tiuj instruistoj tenas la proprajn kvalitojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en vivstilo, kaj en instruado ili pene praktikas la proletaran edukan penson de Prezidanto Maŭ kaj gvidas la tutan instruistaron antaŭenmarŝi.

Por kulturi la lernantojn laŭ la fizionomio de la proletaro, la gvida grupo de Juziŝan-brigado gvidis la revoluciajn instruistojn kaj lernantojn fari reformon al la instruado.

Antaŭ ĉio, klasa batalo vere fariĝis ĉefa instrua objekto en tiu lernejo. Depost la starigo de la lernejo en 1965, la gvidantaj kadroj de la brigado ofte faris raportojn en ĝi kaj krome ĝi ankaŭ invitis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn suferplenajn en la malnova socio al la lernejo por rakonti al la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj la historiojn de iliaj vilaĝoj aŭ familioj.

Ĉie en Juziŝan estas bona klasĉambro por klasbatala eduko, kaj ĉiu el ĝiaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas bona instruisto por klasbatala eduko.

En la malantaŭa ravino de la Orienta Monto de Juziŝan sin trovas kaverno nomata Tigra Kaverno. Maljunaj malriĉkamparanoj Vang Deking, Vang Fujoŭ kaj Li Jun, kiuj devis loĝi en la Tigra Kaverno pro manko de vivrimedo sub la subpremado kaj ekspluatado de bienuloj, ofte rakontis al la lernantoj siajn suferplenajn familiajn historiojn, por ke ĉi tiuj pli forte malamu la malnovan socion kaj la bienulan klason kaj senlime amu la novan socion kaj Prezidanton Maŭ.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri interligo de teorio kun praktiko, la gvida grupo de Juziŝan-brigado starigis la lernobjekton de agronomio kaj forstkulturo, kaj postulis, ke la instruistoj interligu la instruadon en la klasĉambroj kun tiu ĉe la praktikejoj. Ankaŭ en rilato de aliaj lernobjektoj la instruistoj faras instruadon laŭ la principo de interligo de teorio kun praktiko.

Vang Baŭcang, kiu instruas agronomiajn kaj forstkulturajn sciojn, estas lerta en apliko de nova instrua metodo. Ekzemple, antaŭ semado de tritiko, li ne nur donis lecionojn pri aranĝo de la kampoj, intermikso de semoj kun sterko aŭ insektmortigilo, sterkado, prevento de insektoplago ktp., sed ankaŭ gvidis la lernantojn partopreni la tutan procedon de semado de tritiko, por ke ili modeste lernu de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj bone interligu teorion kun praktiko.

Pri tia instruado la lernantoj estas tre kontentaj. Dank' al la lernado kaj praktikado, ili ellernis fundamentajn sciojn kaj labormetodojn de agrokulturo kaj forstkulturo.

En aŭtuno de 1968, antaŭ la diplomiĝo de la unua grupo de lernantoj de Juziŝan-mezlernejo, la gvida grupo de la brigado decidis, ke malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj faru finan pritakson al la lernantoj. Ili fiksiris por la lernantoj certan tempon, ke ili enketu pri la historio de batalo inter la du linioj en Juziŝan-brigado. Sub la subteno de la produktaj grupoj, la lernantoj faris tre detalan enketon pri la tuta procedo de la batalo inter la du linioj en Juziŝan-brigado, en la agrara reformo, la starigo de la interhelpa grupo, agrikultura kooperativo kaj popolkomunumo, socialisma eduka movado kaj la iranta Granda Proletara Kultura Revolucio, kaj verkis raporton pri la enketado. Kaj poste, la revolucia komitato de la brigado decidis asigni tri semajnojn da tempo al la diplomotoj, ke ĉi tiuj helpu la komunumanojn en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, organizu kunvenon por kritiki reviziismon kaj burĝaran ideologion, propagandu Maŭzedongpenson kaj faru klasbatalon. Post ilia praktikado dum certa tempo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris kontente: "La lernantoj, kiujn ni elkulturis, havas sciojn kaj praktikajn spertojn, ili estas kapablaj 'duoble', do ni konsentas, ke ili diplomiĝu."

En aŭgusto de 1969, oni aplikis novan metodon en ekzameno pri la politika leciono de la dua diplo-

miĝonta klaso de la mezlernejo. Oni lasis la lernantojn elekti por si po unu diron de Prezidanto Maŭ por rakonti, kiel ili vive studis kaj vive aplikis ĝin kaj samtempe analizis per ĝi la realon de sia produkta grupo. Tiufoje, la kadroj de la brigado, reprezentantoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la familiestroj de la lernantoj kaj la instruistoj partoprenis la pritakson. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis la lernantojn, kiuj faris kiel ili diris, kaj senindulge montris la mankojn de tiuj, kiuj bele diris, sed ne tiel bone agis. Ekzemple, post la raporto de iu lernantino Vang, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj faris relative bonajn rimarkigojn pri ŝi kaj eldiris unu plian bonon de ŝi, nome ŝi organizis studrondon de Maŭzedongpenso en sia familio por helpi sian patron batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon. Iu alia lernanto parolis tre elokvente, sed li agis ne sufiĉe bone, tial malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj montris, ke li devas fari energian

klopodon en "aplikado". Tiamaniere oni ŝanĝis la ekzamenejon en vivecplenan kunvenon por interŝanĝo de spertoj pri viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kaj ĉiuj partoprenantoj ricevis de ĝi profundan edukon de Maŭzedongpenso.

Ĉu la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Juziŝan-brigado administris la lernejon sukcese? La kvalito de la du grupoj da diplomitoj de la lernejo estas la plej bona respondo pri tio. Ĉiuj diplomitoj de tiu lernejo estas laboruloj kun klareco kaj socialisma konscio. Nun ili estas aŭ vicedstro aŭ konservanto de produkta grupo, manipulanto de man-traktoro, elektro-laboristo, nudpieda kuracisto, instruisto ktp., kaj plejparto de ili estas helpantoj de komunumanoj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris, ke la lernantoj elkulturitaj sub la direktado de la proletara eduka linio de Prezidanto Maŭ povas ludi bonan rolon sur ĉia laborposteno.

Instruisto instruas al lernantoj sciojn pri branĉotondo.



Du Sapoj

IUN tagon, Gaŭ Suĝen, komunumano de Dongĉang-brigado, Hifeng-gubernio, Liaŭning-provinco, trovis du sapojn pakitajn en papero sub la ŝranko. Ŝi demandis sian edzon, kaj tiu respondis, ke li ne aĉetis sapon; ŝi demandis siajn infanojn, ankaŭ tiuj sciis nenion pri tio. De kie venis la du sapoj?

Poste kiam ŝia unua filo montris al ŝi la paperon kun skribaĵo "La Ĉina Popola Liberiga Armeo", per kiu oni pakis la sapojn, la afero tuj klarigis.

Iun majan tagon de la pasinta jaro, batalantoj de la liberiga armeo plenumantaj taskon en la brigado devis iri al guberniurbo por kunveno. Antaŭ ekiro, ili lavis kaj flikis ĉiujn lavendajn kaj flikendajn, por ke malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne faru tion post ilia foriro. Iuj kamaradoj, kiuj ne havis tempon fari tion antaŭ la ekiro, portis siajn litaĵojn al la provizora kuirejo de la trupo kaj petis kuiriston Huang gardi tiujn litaĵojn.

Post akcepto de la peto, maljuna Huang tre atentis la litaĵojn. Kiam li devis porti akvon, li ŝlosis la pordon. Tio tre maltrankviligis Gaŭ Suĝen kaj Gaŭ Ŝujong. Ili iradis ĉirkaŭ la kuirejo por elpreni la litaĵojn de la batalantoj, sed ili neniam sukcesis kapti ŝancon. Poste, venis al ili en la kapon ideo. Ili venigis paŝtknabon Caŭ Venhi, kiu interrilatas tre intime kun maljuna Huang, kaj diris al li ĉion pri sia intenco. La paŝtisteto tre amas batalantojn de la liberiga armeo, li tuj foriris por serĉi Huang, akceptinte la gloran taskon. Per tono de plenaĝulo la paŝtisteto diris kun seriozezo: "Onklo Huang, hodiaŭ

mi havas iun problemon; vi bone studas Maŭzedongpenson, do helpu min solvi ĝin, ĉu bone?" Tion aŭdinte, Huang tre ĝoje pensis en si: Propagandi Maŭzedongpenson estas devo de la liberiga armeo. La knabo Caŭ estas ludema kaj estas malfacile trovi lin. Hodiaŭ li mem alvenis kun aktuala penso, mi ne devas preterlasi la ŝancon. Sub la akcelo de la knabo li forgesis ŝlosi la pordon kaj gaje foriris kondukante la paŝtknabon per la mano.

Kiam Huang foriris de la kuirejo, Gaŭ Suĝen kaj Gaŭ Ŝujong tuj eniris, elprenis la litaĵojn de la kamaradoj, ilin portis hejmen kaj lavis.


Post kvin tagoj, la kamaradoj revenis de la guberniurbo kaj trovis, ke iliaj litaĵoj estas lavitaj. Ili grumblis, ke maljuna Huang estis "nesingardema" kaj ke tio ĝenis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Por plenumi la Tri Ĉefajn Regulojn de Disciplino de la liberiga armeo ili decidis sendi sapojn al la lavintoj. Por ripari sian "eraron", maljuna Huang volonte akceptis la taskon sendi sapojn. Sed, ĉiufoje, kiam li alsendis, Gaŭ Suĝen diris same: "Armeanoj kaj popolanoj estas samfamilianoj. Nenion indas mia nemenciinda faro!

Por kio la sapoj? Ilin reportu!" Kaj ŝi eklaŭdis seninterrompe kiel la PLA-anoj fervore propagandas Maŭzedongpenson, kiel ili zorgas pri malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj post sia veno en la vilaĝon. Kion fari? Maljuna Huang nur povis foriri kun tio, kun kio li alvenis.

En novembro de la pasinta jaro, la trupo plenumis la taskon kaj devis foriri. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ilia propra armeo havas inter si profundan amikecon kaj kuraĝigis unu la alian. Ĉiam tenante en la koro la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "efektivigi nian politikon, observi la Tri Ĉefajn Regulojn de Disciplino kaj la Ok Punktojn de Atentigo", maljuna Huang nerimarkite eniris en la domon de Gaŭ Suĝen, kiam neniu troviĝis en domo. Por ke Gaŭ Suĝen ne tuj trovu kaj resendu la sapojn, li pakis ilin per papero kaj metis ĝin sub la ŝrankon.

Nun, kiam malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rememoras pri la neforgeseblaj tagoj pasigitaj kun siaj intimuloj kaj rakontas pri la du sapoj, ĉiuj varme diris: "La PLA-anoj restigis al ni ne du sapojn, sed la gloran revolucionan tradicion!"





Korliga Ponto de la Armeo kaj la Popolo

ANTAŬ vilaĝeto de limregiono de la Suda Maro kuŝas ferbetona ponto. La tieaj komunumanoj kaj la garnizona trupo de la liberiga armeo nomas ĝin Korliga Ponto de la Armeo kaj la Popolo.

Origine ĝi nomiĝis Lotus-ponto kaj montriĝis ne tia, kia la nuna. En la aliformigo de la antaŭa ponto en la nunan montriĝis profunda amo de la armeo al la popolo kaj subteno de la popolo al la armeo.

La antaŭa Lotus-ponto estis ligna, ĝiaj ambaŭ ekstretoj kadukiĝis kaj la planko oblikviĝis, kaj estis netrairebla por bovcaro aŭ traktoro.

Foje, la trupo kantonmentanta proksime de la vilaĝeto venis por partopreni produktan laboron. Vidinte, ke la ponto estas maloportuna por trafiko, ĝi konscie organizis "popolaman ripar-taĉmenton". Ĉiufoje, reveninte de laboro en la kampo, la oficiroj kaj soldatoj tuj ĵetis sin en intensan riparon de la ponto. Post tri tagoj, dank' al la unuanima kunlaboro la ligna ponto estis bone riparita. La komunumanoj diris kun granda ĝojo: "La PLA-anoj ja estas intimuloj de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaĵmezkamparanoj!" Por ĉiam memori la profundan amon de la

popola armeo al la popolo ili alinomis ĝin Popolama Ponto.

Poste, la trupo translokiĝis. Sed la truĉoj ankoraŭ ofte iris tra la ponto kiel antaŭe. Foje, kvar ĉevalĉaroj de transporta grupo de la trupo kun urĝa materialo venis antaŭ la ponton, sed ne povis trairi, ĉar la ponto estis ĵus detruita de forta tajfuno. Sub la gvido de milita batalionestro la kernaj milicianoj de la vilaĝo rapidigis la urĝan riparadon. Ĉiuj esprimis: "Ni nepre devas rapide ripari la ponton, por ke la ĉevalĉaroj de la trupo akurate atingu la destinitan lokon!"

La milicianoj kaj la soldatoj pene laboris. Ankaŭ virinoj, maljunuloj, gejunuloj kaj geknaboj de la vilaĝo alrapidis por partopreni la laboron. Aŭdinte, ke mankas unu ĉeftrabo, Avo Lin alsendis

sian lignan trabon preparitan por konstrui domon.

Kiam la ĉevalĉaroj trairis la ponton, la homoj emocie kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Ekde tiam, kamaradoj de la trupo nomis ĝin Armesubtena Ponto.

Poste, la inĝeniera roto de la trupo kaj la milita bataliono de la brigado kune anstataŭigis la lignan ponton per ferbetona, kiam la trupo kaj la komunumanoj rimarkis, ke la ponto jam ne respondas la ĉiam plivigliĝantan trafikon. En la tago de lanĉo de la nova ponto, por esprimi la profundan intimecon inter malriĉkamparanoj kaj malsuperaĵmezkamparanoj kaj batalantoj de PLA, la revolucia komitato de la brigado oficiale nomis ĝin Korliga Ponto de la Armeo kaj la Popolo.

Korespondi Deziras

GDR

Laboristo-esperantisto William Mock, 41-jara, patro de kvar infanoj, dez. kor. kun esperantistoj diverslandaj kaj i.ŝ. pri ĉiu temo. Lia adreso: 402/Halle Saale, Emst-Moritz-Amdt-str. 6

Italio

Revello Giorgio, dez. kor. kaj i.ŝ.

pri entomologio kaj papilioj. La adreso: Via Kichelmy 20, 10126 Torino

Pollando

Jan Dżurko, dez. kor. pri ĉiuj temoj kaj i.ŝ. interesajn bildkartojn. La adreso: Sosnomic ul. Tubelno 38.

La Ruĝgvardianoj de Hinŝan-Brigado

ĈU HJUE

EN Hinŝan-brigado de Jongning-komunumo, Ĝugi-gubernio, Ĝegiang-provinco troviĝas tre vigla ruĝgvardiana propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso. Jen estas fragmentoj el ĝia agado.

Iunokte, la ruĝgvardianoj varme diskutas ĉirkaŭsidante en brila studĉambro de Maŭzedongpenso de la grupo je la nomo de “Lej Feng”.

“Oni devas fari memkritikon, kiam ili trovis eraron ĉe si.” Leginte la

vortojn de Prezidanto Maŭ, ruĝgvardianineto Guo Fangfen diris la unua: “Hieraŭ la kverelo inter mi kaj Hiaŭjing influis la propagandan prezentadon, tio estas mia kulpo, ĉar mi metis mian propran opinion

Kun la spirito konstrui sian lernejon kun diligentemo kaj ŝparemo, la ruĝgvardianoj mem riparas tablojn kaj benkojn.



sur la unuan lokon kaj rifuzis organizan disciplinon..." Ne finiĝis ŝia parolo, Guo Hiaŭjing jam ŝin interrompis: "Ne, tio estas mia kulpo, ĉar mi estas respondeculo de la propaganda taĉmento. Mi ne konsiliĝis kun ĉiuj aliaj pri la afero sed mi sola decidis ĉion; tio estas manifestiĝo de aroganteco."

Tiel okazis la afero. Hieraŭ dum prezentado de la ruĝgvardiana propaganda taĉmento, estiĝis disputo inter Fangfen kaj Hiaŭjing pro malsama opinio pri iu danca movo, tiel ke finiĝis haste la prezento. Tio kaŭzis malplezuron al ĉiuj. Tiunokte, post hejmenreveno, ambaŭ ili longe pensis pri la okazintaĵo. Prezidanto Maŭ instruis: "**Ĉar ni servas al la popolo, sekve se ni havas mankojn, ni ne timas, ke aliaj ilin montras kaj kritikas.**" En kontrasto de sia ago al la instruo ili trovis ion nemodestan en si. Tial, en kunsido de la sekvinta tago ili faris respektive memkritikon kaj amikiĝis kiel antaŭe.

Iutage, en fiŝlageto de komunumo flosis baldaŭ mortonta fiŝo, ruĝgvardiano Goŭ Guogen kaptis ĝin, kuiris kaj manĝis. Poste li konsciis tion nedeca. Formanĝi fiŝon de la kolektivo estis bagatelo, sed en tio manifestiĝis, ke li ne distingas individuan intereson de kolektiva. Li pentis pro tio kaj tuj iris al la brigada revolucia komitato por konfesi sian eraron kaj faris memkritikon. Post hejmenreveno li pensis: Per kia ago ripari la eraron? Ĉar fiŝidoj rapide kreskos, se oni ilin nutras per freŝaj herboj, li ĉiumatene eltiris kaj jetis faskon da herboj en la lageton, por ke la fiŝidoj manĝu kaj rapide kresku.

Ruĝgvardianoj Guo Hiafang, Guo Mingĝu kaj aliaj estis asignitaj kiel konservistoj de gretenejo en someraj ferioj. Sed tiun laboron ili neniam faris antaŭe, tial al ili forte batis la koro. Tiutempe, maljuna konservisto Guo Baŭkun venis kun pesilo kaj instruis al ili: "En la malnova socio, la pesilo estis tenata en la manoj de bienuloj, lokaj tiranoj kaj iliaj lakeoj, sed ne de ni malriĉkamparanoj kaj malsu-

peraj mezkamparanoj. Pere de malsamaj pesiloj ili kruele ekspluatis nin laborantan popolon. Post la Liberiĝo, ni malriĉuloj fariĝis mastroj de la ŝtato, kaj la pesilo estas tenata de ni. Infanoj, ni ja devas bone mastrumi por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj."

"Trankviliĝu, maljuna Onklo! Ni certe bone servos al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj."

Iun tagon, ili sunumis grenon kune kun komunumanoj sur placo, kaj poste kolektis ĝin en gretenejon korbon post korbo. Por ne perdi unu grajnon, ili balais per balailo aŭ kolektis per manoj la grajnoj falintajn en interŝtonojn.

La infanoj sane kreskas kiel plantidoj sub la varma suno.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis: Havante tiajn bonajn idojn, ni ja estas ĝojaj!

Kamarado Feng Lianpei (meze), la sekretario de la partia filio de la brigado, inter ruĝgvardianoj.





NOVA KAJ GRANDA CISTERNO- VAGONO POR LIKVA AMONIAKO, LA UNUA EN ĈINIO

En la triumfaj kantoj por la kompleta venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vasta revolucia laboristaro de Ginhi-a Kemiindustria Meĥanika Fabriko en Liaŭning-provinco, plene disvolvante siajn neelĉerpeblan saĝon kaj kreivon de la laborista klaso, kun sukceso alt-rapide kaj bonkvalite memprojektitis kaj provfabrikis novan kaj grandan cisternovagonon por likva amoniako, la unuan en Ĉinio.

Likva amoniako estas grava materialo uzata en la industrio de nacidefendo kaj kemisterka fabrikado. Ĝi estas venena kaj eksplodema. La nova cisternovagono estas farita el alteforta malalt-aloja ŝtalplato, produktita de Ĉinio kaj estas nova en strukturo kun formo de fiŝa ventro. Kompare kun la plej granda cisternovagono por likva amoniako nun kuranta en Ĉinio, ĝi estas duoble pli granda en volumeno, dum ĝia propra pezo reduktiĝis per 20%; tiel, ĝi multe altigis la efikecon de transportado, kaj post veturado ĝi estis ekspertizita de la koncerna organizo, ke ĝia koeficiento de la propra pezo kaj ĝia uzebleco jam atingis la progresintan nivelon de la mondo.

GLUETUMO DE ŜPINAĴO SEN UZO DE GRENO KAJ SEBO

Serioze efektivigante la instrukcion de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ "faru revolucion kun ŝparemo", la vastaj amasoj de la

revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj de kotona ŝpinteksa industrio de Ŝanhajo kuraĝe faris teknologiajn renovigon kaj eltrovis, post ripetada eksperimentado, novan teknologion de gluetumo per kemia gluetaĵo anstataŭ amela gluetaĵo, dank' al kies apliko oni povas tute ne uzi grenon kaj sebon en gluetumo de ŝpinaĵo.

Ŝpinaĵo devas esti gluetumita antaŭ ol teksti ŝtofon el ĝi. Por tiu procedo, antaŭe oni ĉiam uzis tritikan aŭ rizan farunon kiel la ĉefan materialon de gluetaĵo enmiksita kun konvena kvanto da sebo, kaŭstika sodo kaj aliaj kemiaĵoj. Sed kiam oni prestinkturas, ŝtofon, oni devas forlavi la gluetaĵon en la ŝtofo, por kio granda kvanto da homfortoj, vaporo kaj kemiaĵoj devas esti konsumita, kaj granda kvanto da greno kaj sebo estas tiamaniere forportata en riveron kiel senutilaĵo.

Praktika apliko de la nova teknologio en kelkaj monatoj pruvis, ke en la fabrikoj ĝin aplikantaj ne nur la konsumo kvanto de homfortoj kaj materialoj estas multe reduktita, sed samtempe plifortiĝis la eltenivo de ŝpinaĵo al frotado, malgrandiĝis la procentoj de fadenrompiĝoj kaj malmultiĝis la ŝtofo difektita de gluetaĵaj aŭ oleaj makuloj.

Vasta estas la fonto de la materialoj por tia kemia gluetaĵo, kiuj estas ĉeloke akireblaj. Celulozo el tritika tigo, fragmito kaj maizspika internaĵo kaj senutila kotono el teksejo kaj postrestintaj fibroj sur kotonsemoj povas esti uzataj por fari tian gluetaĵon kaj la procedo de ĝia fabrikado estas relative simpla.

BRULFORNO POR NIGRA LIKVAĴO

En produktado, la Ŝanhaja Pulp-fabriko konsumis grandan kvanton da kaŭstika sodo, kiu perdiĝis en la nigra likvaĵo post premfiltrado kaj estis portata en riveron. En ĉiu tago, dekkelkaj tunoj da kaŭstika sodo tiel perdiĝis en la kloakon kaj serioze malpurigis akvon en rivero. La laboristoj de tiu fabriko firme decidis ŝanĝi tiun staton. Post pli ol okdek eksperimentoj, ili sukcesis fari brulforon por nigra likvaĵo, per kiu oni povas akiri pli ol 200 tunojn da kaŭstika sodo en ĉiu monato.

“五 一”

“Wǔ Yi”
(kvin unu)

La Unua de Majo

“五一”¹ 是国际劳动节，也是中国劳动人民的
“Wǔ yī shì guójiā láodòngjié, yě shì Zhōngguó láodòng rénmin de
(kvin unu esti internacia laborfestoj ankaŭ esti Ĉinio labori popolo ...
“La Unua de Majo” estas internacia laborfestoj kaj ankaŭ festotago de la ĉina laboranta

节日。但是在旧中国，反动派每到这天就要
jiēri. Dànshì zài jiù-Zhōngguó, fǎndòngpài měi dào zhè tiān jiù yào
festotago sed en malnova Ĉinio reakciulo ĉiam alveni tiu tago tuj voli
popolo. Sed en la malnova Ĉinio, ĉiam kiam alvenis tiu tago, la reakciuloj nepre plifortigis

加强白色恐怖，镇压劳动人民。到了新中国，劳动
jiāqiáng báisè kǒngbù, zhènyā láodòng rénmin. Dào le xīn-Zhōngguó, láodòng
plifortigi blanka teroro subpremi labori popolo alveni nova Ĉinio labori
blankan teroron kaj subpremis la laborantan popolon. Nur en la nova Ĉinio, la laboranta

人民才能欢庆自己的节日。我们深深感到生活
rénmin cái néng huān qīng zìjǐ de jiēri. Wǒmen shēnshēn gǎndào shēnghuó
popolo ek-povi ĝoji festi propra festotago ni profunda senti vivi
popolo povas ĝoje festi sian festotagon. Ni profunde sentas ke vivi en la

在社会主义的中国无比地幸福。
zài shèhuìzhūyì de Zhōngguó wúbǐdì xìngfú.
en socialism-a Ĉinio senkompare feliĉa)
socialisma Ĉinio estas senkompare feliĉe.

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografiaĵoj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformoj en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas esperanta traduko de la frazoj. Necesaj klarigoj por malfacilaj punktoj estas donataj sube:

¹ “五一” signifas “la unua de la kvina monato”. En la ĉina lingvo, oni nomas la 12 monatojn

de la jaro per numeroj de la unua ĝis la dekdua, do majo estas la kvina monato. En dato antaŭiras la jaro kaj poste sekvas laŭvice la monato kaj tago. La unua de majo estas “五月一日”, kiun oni skribas mallonge per “五·一” sen 月 (monato) kaj 日 (tago). Ĉar la “laborfestoj de la unua de majo” estas tre konata festotago, sekve oni forlasas ankaŭ la centran punkton kaj skribas pli mallonge per “五一”.

Nia Ekonomia Helpo al Amikaj Landoj

“Vere Senegoisma Helpo”

En la pasinta jaro, Kongolando (B) finkonstruis sian unuan modernan teksejon — Kinsoundi-Teksejon. La helkoloraj teksaĵoj kaj delikate belaj trikaĵoj kun malalta prezo kaj bona kvalito produktitaj de ĝi estas tre bonvenaj al la amasoj.

La finkonstruo de la teksejo estas kristalo de amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Kongolando (B). Dum la konstruado, kun la spirito de sinapogo sur propraj fortoj, la ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj mem faris pli ol 2,000,000 cementbrikojn sub la helpo de la kongolandaj (B) laboristoj kaj per tio ŝparis por Kongolando (B) lokajn elspezojn. Krome, ili ankaŭ senrezerve instruis la teknikon al la gefratoj de Kongolando (B). Dum la konstruado de la teksejo, instalado de maŝinoj kaj provproduktado, ili elkulturis ĉ. mil kongolandajn (B) laboristojn.

Maljuna kongolanda (B) kamparano veninta de interna lando diris post sia vizito al la fabriko: “Tio estas vere senegoisma helpo, helpo konforma al la interesoj de la vastaj laborantaj amasoj.” Iu laboristo diris:

“La helpo de imperiismaj landoj celas konservi iliajn privilegiojn en nia lando kaj kateni niajn manojn kaj piedojn. Sed la ĉinaj amikoj senditaj de Prezidanto Maŭ transdonis al ni la teksejon post ĝia finkonstruo, por ke ni mem administru ĝin. La diferenco estas kvazaŭ tiu inter la ĉielo kaj tero.”


Inaŭguro de la “Paca Stadiono” de Zanzibaro

Je la 12-a de januaro okazis inaŭgura ceremonio de la Paca Stadiono de Zanzibaro. En la stadiono estis samtempe okazigita ankaŭ mitingo por celebri la sesan datrevenon de la armita revolucio de Zanzibaro.


Tanzania prezidanto Nyerere prezidis la inaŭguran solenon de la stadiono. En sia parolado li esprimis dankon al Ĉinio pro la donita helpo en la konstruado de la stadiono.

Ĉeestis la celebran mitingon kaj la inaŭguran solenon de la stadiono Ĝoŭ Boping, la konsilanto de la ĉina ambasadorejo al Tanzanio. En sia parolado li diris,

Ĉina ŝpinteksa teknikistino instruas al kongolandaj (B) laboristinoj manipulan teknikon.



*Ĉina teknikisto kune kun
kongolanda (B) laboristo*



ke la nove konstruita stadiono estas alia atingo de la zanzibara popolo de Tanzanio en konstruado de sia lando kaj ankaŭ nova frukto de la amikeco inter la registaroj kaj popoloj de Ĉinio kaj Tanzanio.

La nomita stadiono kun areo de pli ol 90,000 kvadrataj metroj situas en antaŭurbo de la urbo Zanzibaro.

Ĝi povas enteni 10,000 spektatorojn. Dum la konstruado, la ĉinaj teknikistoj ricevis varman zorgon kaj subtenon de la zanzibaraj registaro kaj popolo de Tanzanio. La harmonia kunlaborado inter ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj kaj la zanzibaraj laboristoj ebligis ke la konstrua laboro estis glate plenumita.

Komenciĝo de Fiŝkaptado de la Darunta Eksperimenta Fiŝbredejo

La Darunta Eksperimenta Fiŝbredejo de Afganio komencis kapti fiŝojn ekde la fino de la pasinta jaro. Tio markis la sukceson de la kunlaboro inter Ĉinio kaj Afganio pri fiŝbreda eksperimento.

La konstruo de la fiŝbredejo estis komencita en 1967, kaj tien oni enkondukis kelkajn bonajn speciojn de fiŝoj el Ĉinio. Post eksperimenta bredado en pli ol du jaroj iuj fiŝoj jam kreskis ĝis ĉirkaŭ 6 kilogramoj, kaj estis

pruvite, ke tiuj bonaj fiŝspecioj el Ĉinio estas tute taŭgaj por bredi en Afganio.

Dank' al amika kunlaboro kaj kuna penado de la teknikistoj kaj laboristoj de Ĉinio kaj Afganio kaj utiligo de ekzistantaj naturaj kondiĉoj, estis atingite ke la fruktdono estis rapida kaj la investo estis malmulta. Tio estas konvena por Afganio en disvolvado de sia nacia ekonomio.

La Ĉinaj Teknikaj Laborantoj en Fremdaj Landoj

Iras al laboro kune kun la zambiaj laboristoj la membroj de la mezura grupo de la projekta sekcio de la Ĉina Fervoja Esplora kaj Mezura Brigado helpanta Zambion.





Ĉinaj inĝenieraj kaj teknikaj laborantoj de kulturebligo kaj akvoutiligo helpas la maŭritanian popolon sukcese elkreskigi rizplantojn. Jen ĉina teknika laboranto kaj maŭritania praktikanto laboras en eksperimenta rizkampo.



Ĉinaj fontoserĉaj inĝenieroj kaj teknikistoj laboras kune kun jemenaj laboristoj.




Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉinaj medicinaj laborantoj en Alĝerio tutkore kaj tutanime servas al la alĝeria laboranta popolo. Ili ofte vizitas paŝtejojn en Sahara por fari rondiran kuracon kaj ricevis bonvenon de la lokaj paŝtistoj.

Ĉinaj teknikaj laborantoj en la brodkasta centro de la radio "Voĉo de la Kongolanda (B) Revolucio" instruas al ĝia laboranto manipulan teknikon.



*Ĉinaj inĝenieraj kaj teknikaj laborantoj
en la peza ilmaŝina fabriko Taksila de
Pakistano laboras kune kun pakistanaj
laboristoj.*



*Membroj de la Ĉina Kuraca Taĉmento
faras rondiran kuracon en kamparo
de Tanzanio.*



“Ĉevalŝanĝo” Farso sub la Bajoneto

de la Sovetunia Reviziismo

ĈEĤOSLOVAKIO sub la milita okupado de la sovetunia reviziisma social-imperiismo estas sieĝata de sennombraj malfaciloj kaj krizoj. Kvan-kam la sovetunia reviziismo subtenas per sia bajoneto kaj senĉese ŝanĝas siajn marionetojn, tamen ĝi neniel povas deteni la daŭran disvolviĝon de la batalo de la ĉeĥoslovaka popolo kontraŭ agreso kaj naciperfido. La tagoj de la sovetuniaj reviziistoj kaj iliaj komplicoj estas tre malfacilaj.

Por teni sian koloniisman regadon en Ĉeĥoslovakio, la novaj caroj de la sovetunia reviziismo direktis alian farson de “ĉevalŝanĝo” je la fino de januaro, 1970. Oldrich Cernik estis eksigita de la posteno de ĉefministro de la ĉeĥoslovaka reviziismo kaj anstataŭigita de Lubomir Strougal, kiu estas pli lojala al la sovetuniaj reviziistoj. Tri el la 11 membroj de la Prezidentaro de la Centra Komitato de la ĉeĥoslovaka reviziisma partio estis anstataŭigitaj kaj 15 membroj de la Centra Komitato inkluzive de Aleksandro Dubcek estis eksigitaj. Anstataŭigitaj estas ankaŭ la plejparto de la ĉeĥaj, slovakaj kaj prahaj partiaj kaj registaraj ĉefoj. Tio ĉi estas daŭrigo de la du grandaj purigoj kaj “ĉevalŝanĝoj” faritaj de la novaj caroj de la sovetunia reviziismo interne de la ĉeĥoslovakaj reviziistoj en aprilo kaj septembro de 1969. Flirtigante la nigran flagon de la “teorio de limigita suvereneco” de Breĵnev, la novaj caroj de la sovetunia reviziismo ekstreme barbare intervenis en la internan aferon de Ĉeĥoslovakio. Kiu ajn agas energie laŭ la “doktrino de Breĵnev”, tiu promociiĝas, alie li estas forĵetita. En aprilo de la pasinta jaro, A. A. Greĉko, ministro de nacidefendo, kaj V. S. Semenov, vicministro de eksterlandaj aferoj de la sovetunia reviziisma kliko publike prenis komandon en Praha en la nomo de “komisiito de la sovetunia registaro”, forĵetis Aleksandro Dubcek, la tiaman unuan sekretarion de la Centra Komitato de la ĉeĥoslovaka reviziisma partio, kiu ne tiel energie subpremias la popolon, kaj metis

en la postenon Gustav Husak, kiu estas pli obeema al la sovetunia reviziismo. Tuj poste, la sovetuniaj reviziistoj instigis Husak-klikon fari amasan purigon en la partio kaj registaro. Sole en septembro de 1969, pli ol 90 personoj estis forlavitaj el centraj partiaj kaj registaraj organizoj inkluzive de 29 membroj de la partia centra komitato, kaj duono de la membroj de la federacia kaj ĉeĥa registaroj estis forlavitaj. La farso de “ĉevalŝanĝo” surscenigita foj-refoje kiel karuselo fare de la sovetuniaj reviziistoj montras, ke la sovetuniaj reviziistoj kaj iliaj pupoj en Ĉeĥoslovakio jam ne povas “stabiligi” la “situation” post la invado de la sovetuniaj reviziistoj al Ĉeĥoslovakio, tial ili devas starigi kaj ŝanĝi siajn pupojn foje kaj refoje kun la helpo de sia bajoneto.

La neakordigebla kontraŭdiro inter la sovetuniaj reviziismaj agresantoj kaj la ĉeĥoslovaka reviziisma pupa kliko en unu flanko kaj la ĉeĥoslovaka popolo en la alia estas absolute nesolvebla per “ĉevalŝanĝo”. Per sia surprizatako al Ĉeĥoslovakio en aŭgusto de 1968 kaj sia longtempa milita okupado kaj faŝisma regado, la sovetunia reviziisma social-imperiismo tenis kontroladon super Ĉeĥoslovakio en militaj aferoj, politiko, ekonomio kaj kultura sfero, tiel reduktante la landon al kolonio de la sovetunia reviziisma social-imperiismo kaj alportante teruran nacian katastrofon al la ĉeĥoslovaka popolo. Sed, ĝuste kiel Friedrich Engels en kondamno de cara Rusio kaj aliaj imperiismaj landoj pro ilia divido de Pollando montris: **“Neniu kiu sklavigas iun nacion povas esti nepunita.”** La sovetunia reviziisma social-imperiismo ne povas esti escepto. Ĝia krimo de koluziado kaj konkuro kun la usona imperiismo en prirabo kaj agreso povas nur veki indignon kaj kondamnon de la popoloj tra la mondo. Ĝiaj tankoj kaj kanonoj neniam povas konkeri la volon de la ĉeĥoslovaka popolo batali por nacia liberigo. Kontraŭe, la ĉeĥoslovaka popolo metis ĉirkaŭ la kolo de la

sovetuniaj reviziismaj novaj caroj ŝtalan maŝon forĝitan en la fajro de sia batalo kontraŭ agreso, kaj estas streĉanta ĝin pli kaj pli forte.

Dum la milita okupado fare de la sovetunia reviziismo, la batalo kontraŭ agreso kaj naciperfido kondukata de la ĉeĥoslovaka popolo, kiu decideme defendas la sendependecon de la patrolando kaj naciajn dignon, senĉese leviĝas ondon post ondo, forte frapante la koloniisman regadon kondukatan laŭ la “doktrino de Breĵnev”. Vizaĝe al la potenca ŝtormo de la batalo de la ĉeĥoslovaka popolo, la sovetuniaj reviziismaj novaj caroj kaj iliaj lakeoj forte terurigis kaj ĉiam maltrankvilas. Guste kiel Husak konfesis en sia parolado: “Neniu scias, kiel pasos tiu ĉi aŭ la sekvanta semajno.” En tiu tempo, la panikaj sovetuniaj reviziismaj novaj caroj sendis dekojn da kirasaŭtoj kaj militaj veturiloj por “gardi” la sovetunian reviziisman ambasadorejon en Ĉeĥoslovakio, klopodante grandigi sian kuraĝon per la helpo de testudkarapacoj. Tio tute malkaŝis la papertigran naturon de la sovetunia reviziisma social-imperiismo, kiu estas feroca vizaĝe sed malkuraĝa kore.

La milita okupado kaj koloniisma sklavigo de la sovetunia reviziisma social-imperiismo kaj la tuta serio da aranĝoj por kapitalisma restaŭro farita de la ĉeĥoslovakaj reviziistoj jam alportis gravan katastrofon al la ĉeĥoslovaka nacia ekonomio. La industria kaj agrokultura produkto malkreskas jaron post jaro, akre mankas varoj, ĝenerale altiĝas la prezoj, pestas inflacio, pliiĝas defcito kaj multiĝas ŝuldoj. Husak devigite konfesis en januaro de 1970: “La tuta ekonomia administrado malfortiĝis kaj malordigis.” Li kriis alarme:

“La ekstreme danĝera inflacia tendenco kreskis.” Li diris, ke “estas necese retaksi la tutan ekonomian politikon”. La ĉeĥoslovaka reviziisma ĵurnalo *Rude Pravo* konfesis, ke estis defcito de pli ol 10,000 milionoj da kronoj (ĉ. 1,400 milionoj da usonaj dolaroj) en la ĉeĥoslovaka ŝtata budĝeto de 1969. La ĉeĥoslovaka reviziisma gazetaro ankaŭ malkaŝis, ke en 1969 stagnis la agrokultura produkto kaj multe reduktiĝis la areo de la kulturataj agroj. Rezulte de tio, la merkata provizado fariĝas ĉiam pli malfacila. Estas akuta manko de tiaj konsumajoj kiaj vestoj, ŝuoj, mebloj, radioriceviloj, dommastrumaj elektraj instrumentoj, porkaĵo, legomoj, fruktoj kaj laktoproduktaĵoj. Eĉ gazetaro de la ĉeĥoslovaka reviziismo devigite konfesis kun granda maltrankvilo, ke en nombro da vendejoj “nenio troviĝas sur la bretoj kaj la stoko de multaj varoj atingis krizan punkton”.

Granda kvanto da faktoj montras, ke Ĉeĥoslovakio sub la rekta milita okupado de la sovetunia reviziismo estas tipa kolonio de la sovetunia reviziisma social-imperiismo. Dank’ al siaj propraj spertoj, la ĉeĥoslovaka popolo jam travidis la reaktian naturon de la sovetuniaj reviziismaj novaj caroj; dum la reviziisma Husak-kliko de Ĉeĥoslovakio, kiu forvendas la patrolandon kaj la interesojn de la popolo, senhonte kaj volonte agas kiel lakeo kaj komplico de la sovetunia reviziismo. Antaŭ kaj post sia enpotenciĝo, la kliko kriis ĝis raŭkiĝo por argumenti por la krimoj de la social-imperiismo kaj social-faŝismo de la sovetunia reviziismo, dirante ke la armita okupo fare de la sovetunia reviziismo al Ĉeĥoslovakio estas “tute necesa”, “celas defendi socialismon en Ĉeĥo-

Urbanaj de Prago okazigas potencon manifestacion por protesti kontraŭ la milita okupado de la sovetunia reviziismo.



slovakio” kaj “tute ne estas agreso”. Artikolo publikigita de la ĵurnalo *Rude Pravo* de la ĉeĥoslovakia reviziismo je la 11-a de februaro en la kuranta jaro pli senhonte laŭdis la sovetunian reviziismon kiel “nian fidelan amikon kaj aliancanon”, kiu “defendas niajn sendependecon kaj socialisman konstruadon”.

En kritiko al la oportunistoj en 1907, la granda Lenin montris severe: “La sklavo, konscianta sian sklavecan pozicion kaj batalanta kontraŭ ĝi, estas revoluciulo. La sklavo, ne konscianta sian sklavecon kaj vegetanta en silenta, senkonscia kaj obeema vivo, estas simple sklavo. La sklavo, ĉe kiu salivoj fluas, kiam li memkontente priskribas ĉarmon de la sklava vivo kaj admiras la bonkoran kaj bonan mastron, estas lakeo, senhontulo.” La pupa kliko de la ĉeĥoslovaka reviziismo ĝuste estas tia senhonta lakeo de la sovetuniaj reviziismaj novaj caroj!

Estas necese montri, ke la artikolo de la ĵurnalo de la ĉeĥoslovaka reviziismo *Rude Pravo* en la 11-a de februaro, 1970, ne nur senhonte beligis la sovetunian reviziismon, sed ankaŭ freneze atakis la socialisman Ĉinion, kiu ĉiam subtenas la popolon de Ĉeĥoslovakio. Estas tute ne hazarde, ke tiu artikolo estis elmetita ĝuste je tempo, kiam la sovetunia reviziismo levis grandskalan malican tajdon kontraŭ Ĉinio. La ĉeĥoslovaka registaro eĉ elmetis “proteston” al la ĉina ambasadorejo en Ĉeĥoslovakio je la 9-a de februaro, asertante ke raporto de Hinhua-novajagentejo je la 30-a de januaro, kiu respegulas la oponadon de la ĉeĥoslovaka popolo kontraŭ la sovetuniaj reviziismaj agresantoj, estas “grava interveno en la internajn aferojn de Ĉeĥoslovakio”.

Ekde la komenco de januaro, kontraŭĉinia ĥoro estas organizita de la sovetuniaj reviziismaj oficialaj parolorganoj *Pravda*, *Izvestija* kaj TASU kun A. P. Kirilenko kaj B. N. Ponomarev de la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la korifeoj. Ili freneze atakis la ĉinan popolon, ke ĝi efektivigas la grandan strategian principon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “tenu la revolucion, stimulu la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”, kaj kalumniis Ĉinion pri “opono kontraŭ Sovetunio”. Ehante al la kontraŭĉiniaj gurditaj frazoj de la mastro, la ĉeĥoslovaka reviziisma pupa Husak-kliko ankaŭ eliris por fari kelkajn bojojn, kalumniant ke Ĉinio “intervenis” en la “internajn aferojn” de Ĉeĥoslovakio kaj “subfosis” la “unuigon” de la tiel nomata “socialisma komunumo” inter la

ĉeĥoslovakaj kaj sovetuniaj reviziistoj. Por kio fari tiajn ŝajnigojn? Kiu ja estas tiu, kiu “intervenis” en la “internajn aferojn” de Ĉeĥoslovakio? Ĉu tio ne estas evidenta afero konata de la tutmonda popolo? Kiu ne scias, ke estas la sovetunia reviziisma renegata kliko, via t. n. “fidela amiko kaj aliancano”, kiu okupis Ĉeĥoslovakion en unu nokto per ekspeditaj centmiloj da soldatoj kaj forte konfuzis viajn “internajn aferojn”? Kiu ne scias, ke estas la tankoj kaj bajonetoj de via “fidela amiko” kiuj buĉis centojn da ĉeĥoslovakaj patriotoj kaj metis viajn “internajn aferojn” sub la rektan kontrolon de la sovetuniaj reviziismaj novaj caroj? Kiu ne scias, ke tra la “Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo” la sovetuniaj reviziistoj forrabis kaj ekspluatis grandskale la ekonomian riĉaĵon kreitan de la ĉeĥoslovaka laboranta popolo? La sovetuniaj reviziistoj intervenis en ĉiujn kampojn de la ĉeĥoslovakaj “internaj aferoj” — tiel en militajn aferojn kaj politikon kiel en ekonomion kaj kulturon. Estas kaj ridinde kaj kompatinde, ke vi elektis “intervenon en la internajn aferojn” kiel temon por oponi Ĉinion. Ni volus demandi: La ĉeĥoslovaka teritorio estas perforte okupita, ĝiaj popolanoj estas buĉitaj, ĝia publika opinio estas katenata — ĉu ĉio ĉi tio estas “internaj aferoj” aŭ “eksteraj aferoj” de Ĉeĥoslovakio? La “patriarko” de via “komunumo” antaŭlonge jam senigis vin je “internaj aferoj”, sed faris ne nur “intervenon”! La vera celo de Husak-kliko en ludo de tiu ĉi farso laŭ la ordono de Moskvo estas nenio alia ol subfosi la profundan amikecon inter la laborantaj popoloj de Ĉinio kaj Ĉeĥoslovakio per sia intensigita opono kontraŭ Ĉinio kaj pliapeŝe subpremi la patriotajn popolanojn de Ĉeĥoslovakio.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: “‘Levi ŝtonegon kaj ĝin faligi sur siajn proprajn piedojn’ estas ĉina popoldiro por priskribi la konduton de iuj stultuloj. La reakciuloj en diversaj landoj ĝuste estas stultuloj de tia speco. Iliaj diversaj persekutoj kontraŭ la revoluciaj popoloj, en la fina analizo, servas nur por akceli la popolan revolucion al pli vasta kaj pli intensa skalo.” La agreso, subpremo kaj prirabo fare de la sovetunia reviziismo al la ĉeĥoslovaka popolo kaj la krimaj aktivadoj de la pupa kliko de la ĉeĥoslovaka reviziismo, kiuj perdigas la suverenecon de la ŝtato kaj humiligas la landon, povas nur akceli la revolucion batalon de la ĉeĥoslovaka popolo kontraŭ la usona imperiismo, la sovetunia reviziisma social-imperiismo kaj la ĉeĥoslovaka reviziisma gvidanta kliko kaj plirapidigi la kompletan falon de ili mem.

“Intereso” de la Usonaj Rabistoj

LA ŝtata sekretario de Usono William P. Rogers, konfidato de Nixon, vizitis Afrikon je la 7-a de februaro kun kaŝita celo.

Por krei kontraŭrevolucion publikan opinion por tiu “vizito”, la ĉefo de la usona imperiismo Nixon kaj liaj subuloj publikigis unun post alia parolojn kaj deklarojn, ke la vojaĝo de Rogers montras la “kreskantan intereson de Usono al Afriko”, ke “prezidanto Nixon mem tre zorgas pri Afriko” kaj ke lia vojaĝo “montras nian intereson, ne nur nunan, sed ankaŭ estontan intereson al la kontinento de Afriko kaj al la ekscitaj eventoj kiuj certe okazos en Afriko en la estonto” ktp.

Kian “intereson” Nixon kaj liaj similuloj havas pri la afrika kontinento? La usona registaro mem respondu pri tiuj demandoj!

En anonco pri la vizito de Rogers al Afriko, la Ŝtata Departemento de Usono diris malkaŝe, ke la “vizito” “estas farata... pro ekvido de la kreskanta intereso de Usono en Afriko”. Kio do estas la “intereso de Usono en Afriko”? Tiel frue, kiel antaŭ pli ol 10 jaroj, la tiama usona asistanta ŝtata sekretario William Rountree malkaŝe diris, ke “la usona intereso en Afriko estas la intereso en la kampoj de strategio, politikoj kaj ekonomio”.

Sennombraj faktoj montras, ke la usona imperiismo delonge jam avide rigardadas la riĉfontojn de Afriko. Sub la ŝildo de “helpo”, ĝi klopodas ĉiamaniere kontroli politike kaj prirabi ekonomie la “helpatajn” landojn. Usono rabas de Afriko grandajn kvantojn da strategiaj materialoj, ĉefe rarajn metal-ercojn por fabriki raketojn, ĵetarmilojn kaj termonukleajn armilojn. Preskaŭ la tuta kvanto de la tantalo, tri kvaronoj de la kobalto, duono de la mangano kaj kromo, kvarono de

la diamanto por industria uzo, kvinono de la plumbaj kaj granda kvanto de la uranio enportitaj de Usono estas rabitaj el Afriko. Ĉar la riĉaj materialaj fontoj de Afriko estas tiel gravaj por la usona imperiismo en armeekspansio kaj militpreparo, la rabema usona imperiismo nature montras “intereson” kaj “zorgon” al la kontinento.

La usona imperiismo prirabas Afrikon per diversaj rimedoj, kiaj eksporto de kapitalo al Afriko en granda skalo, malkara aĉeto kaj altpreza vendo, malfermo de entreprenoj, okupo de vastaj areoj de tero, ktp. Jen per ĉiaj manieroj, la usona imperiismo turnis Afrikon en merkaton por dumpingi siajn “superfluaĵojn” produktaĵojn kaj kruele elsuĉi la sangon de la afrikaj popoloj. Ĝi estas la plej feroce vampiro pikanta la afrikajn popolojn!

La politika kontrolo kaj ekonomia prirabo al Afriko fare de la usona imperiismo servas ĝian kontraŭrevolucionan tergloban strategion. La “paca korpuso” kaj “specialistoj” grandnombre senditaj de la usona imperiismo al Afriko estas ĝuste instrumentoj en la efektivigo de ĝia kontraŭrevolucia tergloba strategio. Sub la maskoj de “instruisto”, “kuracisto” aŭ “specialisto”, ili faris sennombrajn krimojn atencantajn la interesojn de la afrikaj popoloj. La afrikaj popoloj diris indigne: “La usona paca korpuso portis al ni ne pacon, sed agreson.” Inter la kolera muĝo de la afrikaj popoloj, nemalmultaj usonaj “pacaj korpusoj” jam foriris panike el Afriko.

La usona imperiismo faris multajn malbonojn en Afriko. Ĝi instigis reakciajn militajn ŝtatrenversojn kaj faris subfosajn aktivadojn en sendependaj afrikaj landoj; ĝi subtenis la pupan klikon de Mobutu subpremi freneze la patriotajn armistajn fortojn kaj la popolojn de Kongolando (K); ĝi subtenas la portugaliajn koloniistojn buĉi afri-

kajn popolanojn; . . . Unuvorte, la usona imperiismo estas la plej feroĉa malamiko de la afrikaj popoloj.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **“En Afriko, la usona imperiismo febre praktikas la novkoloniisman politikon, klopodante anstataŭi la malnovajn koloniistojn, rabi kaj sklavigi la afrikajn popolojn, subfosi kaj estingi la naciliberigan movadon.”** Hodiaŭ, flamas revoluciaj fajroj en Afriko, kaj la 300-miliona vekiĝinta afrika popolo jam vidas pli klare la abomenan vizaĝon de la usona imperiismo.

Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris: **“La tuta Afriko nun estas en la tajdo de opono kontraŭ imperiismo kaj koloniismo.”** Tiu Rogers, kiu havas “intereson” pri Afriko, ricevis malagrablegon, kiam li vizitis Marokon kaj Tunison, la unuajn du landojn en sia vojaĝo al Afriko. La maroka popolo postulis, ke la usona imperiismo “for el la araba mondo”, kaj la tunisaj studentoj kriis: “Nixon, murdisto!” “Rogers, hejmen!”

En la grandaj sepdekaj jaroj, la afrikaj popoloj certe pli vekiĝos kaj levos pli potencajn revoluciajn ŝtormojn kontraŭ la usona imperiismo.

JEN DAVEN:

Putra Reĝimo kaj Fabelo de Nixon

EN sia mesaĝo pri la stato de la lando je la 22-a de januaro, la ĉefo de la usona imperiismo Nixon energie distrumpetis, ke “batalo devas esti farata kontraŭ krimagoj”. Li konfesis, ke en Vaŝingtono, la ĉefurbo de Usono, eĉ usona parlamentano ne kuraĝas piediri sola al sia hejmo. Li petis, ke la usona parlamento starigu leĝon kaj la usona registaro duobligu la “elspezon por helpi la lokojn en efektivigo de leĝo” en 1971 ktp. ktp. Kiel zorge pripensita ruĝo!

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam montris antaŭlonge: **“Multaj kaj nevenkeblaj estas la internaj kontraŭdiroj de la imperiisma sistemo, tiel ke la imperiistoj dronis en grandega ĉagreno.”**

La seriozaj krimagoj en la usona socio estas kaŭzitaj de la imperiisma sistemo de Usono mem kaj ili estas simptomo de tio, ke la krima reĝimo jam putriĝis de la kapo ĝis la piedoj. La ĝemoj kaj krioj de Nixon spegulas nur lian ekstreme grandan ĉagrenon.

En Usono, kiu nomas sin “civilizita lando”, ĉiam senbride aktivadas rabistoj kaj friponoj. Ĉiam kaj ĉie okazadas raboj, ŝteloj, trompoj, vetludoj, fumado de narkotaĵoj, cirkulo de pornografiaj libroj kaj bildoj, seksperfortoj kaj murdoj, kaj tio plimultiĝas kun ĉiu tago. En aŭgusto de 1969, la ĉefo de la Federacia Buroo de Enketado John Hoover konfesis, ke tiujare okazis proksimume 4,500,000 gravaj krimagoj, kiuj estis 17 procentojn pli multaj ol tiuj en 1967. Kaj en decembro li konfesis denove, ke la nombro de krimagoj en la unuaj naŭ monatoj de 1969 plimultiĝis je 12 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de 1968. En vortoj de Nixon: “Tiuj oficialaj statistikaj ciferoj estas nur la vosto de la grandaj ciferoj nur konjekteblaj por ni.” En tio oni povas vidi, kiel putra estas la imperiisma sistemo de Usono!

La krimaj fenomenoj serioze ekzistantaj en la usona socio estas absolute neforigeblaj per kelkaj belaj vortoj de Nixon, starigo de kelkaj leĝoj fare

de la usona parlamento aŭ pliigo de kelkaj “elspezoj por efektivigo de leĝo” fare de la usona registaro.

Ĉiuj scias, ke la tute putra imperiisma reĝimo de Usono estas kaj la radikala kaŭzo de la ekspluatado fare de la plenmano da usonaj monopolaj kapitalistoj al la laboranta popolo, kaj la nesto, kie generiĝas ŝtelistoj, rabistoj kaj friponoj. Ĝuste kiel Lenin elmontris: **“Riĉuloj kaj trompistoj estas la du flankoj de unu medalo, estas du ĉefaj kategorioj de parazitaj, elbreditaj de kapitalismo.”** La reganta kliko de Usono kaj ĝia ĉefo Nixon mem ja estas la ĉefa farinto de la diversaj krimoj. Por konservi sian reakcian regadon, ili faras kruelajn ekspluatadon, prirabon kaj sangan subpremon al la usona kaj la aliaj popoloj de la mondo. Ili estas la plej grandaj krimuloj de rabado kaj hombuĉado.

La reakciaj regantoj kaj monopola kapitalista kliko de Usono ĉiam estas subtenantoj kaj komplicoj de ŝtelistoj, rabistoj kaj friponoj. Ili ĉiuj, ŝtataj oficistoj, komercistoj kaj ŝtelistoj kaj rabistoj, agas en koluzio por damaĝi la popolon. Ekzemple, la multnombraj klikoj de friponoj kaj rabistoj ofte aĉetas, sub la nomo de “mondonaco por fonduso de konkuro en elektado”, diverslokajn politikistaĉojn, ke ĉi tiuj elektiĝu kiel “parlamentanoj” aŭ “ŝtatestroj”, kaj post sia elektiĝo, la politikistaĉoj plenenergie protektas la subaĉetantojn. Ja vaste konata ekzemplo estas la fiaĝo de la malkaŝita juĝisto de la Supera Kortumo de Usono Abe Fortas, kiu ricevas ĉiujare subaĉetan pagon de pli ol dudek mil dolaroj de iu “bankiero”, kiu fabrikis falsajn valorpapirojn. Kaj la reakcia propaganda maŝino de Usono instigadas tage kaj nokte rabojn, pornografion kaj murdojn. Laŭ statistiko, pli ol 1,200 murdaj scenoj estas prezen-

titaj en la ĉiusemajnaj televidaj programoj de la urbo Los Angeles. Nu, sufiĉas la menciitaj ekzemploj por ke oni vidu pli klare, ke la tute putra sistemo de la usona monopola kapitalismo ĝuste estas varmbedo por kreskigo de diversaj krimaj bakterioj. Ĉu ne fabelo el *Mil Unu Noktoj* estas tio, ke la agento de la usona monopola burĝaro Nixon laŭte kriis, ke “batalo devas esti farata kontraŭ krimagoj”, dum li ĉiamaniere defendas tiun kriman sistemon!

Estas aparte necese rimarkigi, ke la starigo de vetludejoj kaj vendado de narkotaĵoj fare de multaj rabistaj kaj kanajlaj klikoj estas efektivigitaj en koluzio kun policianoj. Iuj rabistaj kaj friponaj klikoj subaĉetas policanojn eĉ per miloj da milionoj da dolaroj. Polico kaj krimoj evidente estas interligitaj en Usono. En la sekvanta tago post la publikigo de sia mesaĝo pri la stato de la lando Nixon jam konsentis la proponon de la urbestro de Vaŝingtono pri pliigo de policanoj kaj “elspezo” por “ĉesigo” de “krimagoj”. Oni povas facile antaŭvidi, ke la multigo de la t. n. “elspezo por efektivigo de leĝo” kaj policanoj porpledata de Nixon efektive povas nur plifortigi la faŝisman regadon super la usona popolo.

La revolucia popolo de Usono, kies politika konscio pli kaj pli altiĝas, profunde komprenas, ke la rabistoj, ŝtelistoj, friponoj, kanajloj kaj ĉiuj aliaj krimuloj, kiuj atencas la popolon, estos ekstermitaj nur post la renverso de la damninda imperiisma sistemo, faligo de la monopola burĝaro kaj neniigo de ĉiaj ekspluatado kaj subpremo. Certe venos la tago, kiam la usona popolo forbalaos en la historian rubujon la plenmanon da parazitaj de la usona monopola kapitala kliko, kune kun la monopola kapitalisma sistemo de hommanĝado fare de homo nun ekzistanta en Usono.

Sub la “protektado” de granda kvanto da armitaj policanoj kaj sekretaj gardantoj, la kortrema Nixon sinkaŝanta en la aŭtomobilo kun kontraŭkugla vitro veturas al la Blanka Domo por enoficiĝo.





MILOJ DA LABORISTOJ KAJ STUDENTOJ DE ROMO MANIFESTACIIS SPITE AL PLUVADO

Komence de februaro de la kuranta jaro, laboristoj kaj studentoj de diversaj lokoj de Italio senĉese faris manifestaciojn kaj indigne protestis kontraŭ la barbaraj persekuto kaj subpremo de la reakcia aŭtoritato de Italio al la laboristoj kaj studentoj. En sia batalado, la laboristoj kaj studentoj unuiĝis unuanime, kaj subtenis unu alian kaj firme rebatis la persekuton kaj subpremon fare de la reakcia aŭtoritato de Italio.

Depost la deka de februaro, en Romo sola jam mil laboristoj kaj studentoj, kiuj partoprenis strikon kaj manifestacion, estis maljuste arestitaj. Por protesti kontraŭ la kruelaj persekuto kaj subpremo de la reakcia aŭtoritato, la 14-an, miloj da laboristoj kaj studentoj de Romo okazigis potencon manifestacion spite al pluvo.

Alte tenante dekojn da ruĝaj flagoj, la manifestaci-antoj amasoj brave antaŭenmarŝis laŭ la ĉefaj stratoj. Sur la transversaj slogan-rubandoj kaj slogantabuloj tenataj de ili surskribiĝis: “Unuiĝu por oponi kontraŭ persekuto!” “En la batalo por socialisma revolucio, la studentoj staru ĉe la flanko de la laborista klaso!” “Unuiĝu por frakasi la ŝtatan maŝinon de la burĝaro!”

Kaj la manifestaciantaj amasoj indigne kaj laŭte kriis: “Ne permesu subpremadon!” “Laboristoj kaj studentoj unuiĝu en batalo!” “Revolucion! Revolucio!”

Multaj manifestaciantoj unuvoĉe laŭtlegis vortojn de Prezidanto Maŭ: “Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj.” “Levi ŝtonegon kaj ĝin faligi sur siajn proprajn piedojn’ estas ĉina popoldiro por priskribi la konduton de iuj stultuloj. La reakciuloj en diversaj landoj ĝuste estas stultuloj de tia speco. Iliaj diversaj persekutoj kontraŭ la revoluciaj popoloj, en la fina analizo, servas nur por akceli la popolan revolucion al pli vasta kaj pli intensa skalo.”

En la sama tago, ankaŭ en Bergamo en norda Italio, miloj da popolanoj faris manifestacion spite al pluvo. Ili forte protestis kontraŭ la persekutado de la reakcia aŭtoritato al laboristoj kaj studentoj kaj firme oponis kontraŭ la reviviĝo de la faŝismaj fortoj de Italio.

DU MIL HOMOJ MANIFESTACIIS EN NOVJORKO POR PROTESTI KONTRAŬ PERSEKUTO

La 16-an de februaro, pli ol du mil homoj manifestaciis en Novjorko por protesti kontraŭ la pli kaj pli freneza persekutado de la reakcia aŭtoritato al la popolo. Kiam la manifestaciantoj marŝis de la urbodomo de Novjorko al la juĝeja halo de Novjorko, la reakcia aŭtoritato alsendis grandan nombron da policanoj por blokadi la vojon de la manifestaciantaj amasoj, kaj barbare ilin subpremis. La reakciaj policanoj kruele

*Ministoj de West Virginia, Usono,
okazigas strikon por oponi ekspluatadon
de la monopola kapitalo.*



batis ilin svingante siajn bastonojn kaj faris frenezan arestadon. Ilia perforto vekis ankoraŭ pli grandan indignon ĉe la manifestaciantaj amasoj, kaj ĉi tiuj kondamnis la faŝistan agon de la reakciaj policanoj kaj brave luktis kontraŭ ili per siaj flagstangoj, neĝbuloj kaj glaciaj pecoj.

CENTMIL-HOMA STRIKO EN DANLANDO

Cent mil danaj laboristoj de la profesioj de ŝipkonstruado, preparado de alkoholo, maŝinfarado ktp. rompis la katenon de la reakciaj sindikatoj kaj faris 24-horan strikon je la 2-a de februaro, por protesti kontraŭ la financa kaj ekonomia politikoj persiste efektiviĝataj de la dana registaro, kiuj devigas la laboristojn vivi kun streĉita zono, tute ne zorgante pri la vivo de la vastaj amasoj de laboristoj.

Tiu ĉi striko donis pezan baton al la monopola kapitalo de Danlando.

PERUAJ LABORISTOJ KAJ STUDENTOJ DISVOLVAS BATALON SENTIME

Ekde la komenco de februaro, perujaj laboristoj kaj studentoj senĉese disvolvas batalon por oponi kruelan ekspluatadon kaj akiri rajtojn koncernantajn iliajn rektajn interesojn.

En la ĉefurbo Lima, centoj da urbokonstruaj laboristoj iris sur stratojn, okazigis mitingon en la centro de la urbo kaj manifestaciis por protesti kontraŭ la rapida plimultigo de senlaboruloj kaj postulis altigon de la salajroj. Oni raportis, ke nun sin trovas en Peruo pli ol 300,000 urbokonstruaj laboristoj senlaboraj. Kaj la totala nombro de la senlaboruloj en la tuta lando jam atingis unu milionon.

En la manifestaciado, la laboristoj sentime faris intensan luktadon kontraŭ la reakciaj militistoj kaj policanoj, kiuj alvenis por subpremi ilin.

Samtempe kun tio, senĉese disvolviĝas la batalo de la studentoj de Peruo por oponi la leĝon, kiu malpermesas al ili politikajn aktivadojn.



Letero de Japana Leganto M. S.

Ricevinte la nunan numeron de EPĈ, tuj mi legis la artikolon "En la Tagoj Kiam Ni Okupiĝis pri Esperantaj Laboroj en Jan-an". Jes, ĝi estas tre valora kaj utila al ni. Tiun artikolon ĝis nun mi atendis! Ni bone scias, ke nun, kiam vi, ĉina popolo, enmanigis la potencon, ĉina esperantistaro bone utiligas Esperanton por la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj Ĉina Kompartio. Sed mi ne bone sciis, ne "ne bone sciis", ĝuste dirite, entute ne sciis, kiel

ĉinaj esperantistoj batalis per Esperanto dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito...

Permesu min represigi la artikolon sur nia informilo. Mi volas sciigi ĝin al multaj niaj junaj gekamaradoj.

Letero de Novzelandia Leganto M. L. M.

Hodiaŭ mi ricevis kun neesprimeblaj danko kaj ĝojo la du kalendarojn por 1970. Ili nun gracie pendas ĉe la muroj de mia vivĉambro por la plezuro kaj eduko de mi mem kaj ankaŭ de miaj amikoj kiuj vizitas min. Antaŭ kelkaj tagoj, mi ankaŭ ricevis "El Popola Ĉinio" kaj la kvin broŝurojn en kiuj estas la paroladoj de Prezidanto Maŭ pri diversaj aferoj, kiujn mi nun legas kun profunda intereso kaj edukeco. Mi volas esprimi mian sinceran laŭdon al la presistoj, kiuj tiel bone kaj talente uzas kaj

regas la Esperantan lingvon. La artikolo de k-doj Hju Hong kaj Huang Dong pri siaj Esperantaj Laboroj en Jan-an estis tre interesa. . . . En majo mi atingos mian 81-an datrevenon, sed, feliĉe, mi ankoraŭ povas legi, kaj nun la plej granda ĝojo de mia vivo estas la ricevo de literaturaĵoj pri la sukcesaj atingadoj de la heroo ĉina popolo, sub la saĝa gvido de la nekompareble genia Prezidanto Maŭ.

Letero de Angla Leganto D. F. C.

La kvaliton de EPĈ mi trovas tiel bonega kiel kutime, kaj precipe laŭdinda estas ĝia temo kiu montras la vivmanierojn de la kuraĝaj feliĉaj ĉinaj popolanoj en diversaj partoj de tiu vasta lando. Laŭ la atestaĵo de tiuj bildoj neniuj povas kontraŭi, ke, sub la klera gvidado de via tutscianta Prezidanto Maŭ Zedong, la nuntempa Ĉina Popola Respubliko estas la plej vigla kaj la plej progresema lando en la tuta mondo.

Korespondi Deziras

Argentina

Alberto Luis Passaglia dez. kor.
kaj i.ŝ. p.k., la adreso: Calle 64
n-ro 1739, La Plata (B) Rep.

Ĉeĥoslovakio

Dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj
esperantistoj kaj i.ŝ. insignojn kaj
ilustran ĵurnalon jenaj esperantistoj:

Viliamo Vendel, Komenskeho 4/1
Bardejov

Vaclav Hruby, Lochovice 196, okr.
Beroun

Anna Matejkova, Praskolesy 229,
okr. Beroun

Ondrej Košatka, Černolice 58,
p. Ritka, okr. Praha-Zapad

Karel Červenka, Lochovice 20,
okr. Beroun

Ĉeĥoslovakio

Esperanto-Klubo, Dudince okres
Zvolen, Slovakio

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報通

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (142) 1970

Ĉefa Enhavo

Neelĉerpebla Saĝo de la Laborista Klaso

Penema Spirito en Starigo de Fabriko

Nova Ŝanĝiĝo de la Elektra Centralo Jangŝupu

Materiisma Dialektiko Direktis Nin Fari 10,000-tonelan
Ŝipon

Kilijing-komunumo Akiris Abundan Rikolton en Greno kaj
Kotono

Arĝentaj Montetoj apud Lazura Maro

Modelo de Revoluciaj Junuloj

Subtera Kanaletoj

Kemisterkaj Fabriketoj Stariĝis en Ĉiuj Antaŭurboj de
Ŝanhajo

Akcepti Reedukon kaj Remuldi la Malnovan Ideologion
Hi Ĵujhua post Reveno al la Hejmloko

Lernejo sub Administrado de Malriĉkamparanoj kaj Mal-
supera Mezkamparanoj

Du Sapoj

Korliga Ponto de la Armeo kaj la Popolo

La Ruĝgvardianoj de Hinŝan-brigado

Nia Ekonomia Helpe al Amikaj Landoj

“Ĉevalŝanĝa” Farso sub la Bajoneto de la Sovetunia Revi-
ziismo

“Intereso” de la Usonaj Rabistoj

Putra Reĝimo kaj Fabelo de Nixon

Sur la kovrilo:

La laboristdevena teknikisto Vang Defa (*dekstre*) esploras
novan frotmaŝinon kune kun laboristoj.

Sur la dorskovrilo:

Bildo el Jaŝan


Venkoj en la Industria Fronto

La laborista klaso de nia lando firme plenumas la orientilon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “sinapogi sur propraj fortoj” kaj “peneme lukti en malfaciloj”. La venka produkto de 125,000-kilovata vaporturbina generatora kompleto kun duobla akva interna malvarmigo en Ŝanhajo, kiun ni mem projektis, fabrikis, konstruis kaj instalis, signas eniron de nia lando en progresintan vicon de la mondo en la sfero de elektropova industrio kaj elektromaŝinfara industrio. Laboristoj de la Popola Maŝinfabrika de Pekino sukcesis fabrikis tutfolian, dukoloran, aŭtomatan ofsetan presmaŝinon. La Ilmaŝina Fabrika de Mudangiang fabrikis la unuan serion de kvadrataj plipezigitaj bortuboj por uzo en drilado de petrola puto kaj tiel metis finon al la stato, ke kvadrataj plipezigitaj bortuboj kun longeco de pli ol 6 metroj devis esti importataj.

En la nova kuranta jaro, la laborista klaso de nia lando estas en klopodado por atingi ankoraŭ pli brilajn sukcesojn kaj gajni novan gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la granda socialisma patrolando.

Laboristoj de la Ilmaŝina Fabrika de Mudangiang, kiuj sukcesis fabrikis kvadratajn plipezigitajn bortubojn por uzo en drilado de petrola puto, nun provas fabrikis alian novan produktaĵon.







(Supre) La 125,000-kilovata vaporturbina generatora kompleto kun duobla akva interna malvarmigo



Laboristoj de la Ŝanhaja Fabriko de Komputiloj kaj Skribmaŝinoj, kiuj antaŭe tute ne posedis elektronan teknikon, nun sukcesis provfari transistoran komputilon de tabla tipo.



(Dekstre supre) La Liuĝou-a Fabriko de Rektifiloj sukcesis produkti teknike progresintan fabrikan silician rektifan elementon per siaj memfaritaj ekipaĵoj. Jen laboristinoj laboras antaŭ memfarita vakua sintera forno.

Laboristoj de la Popola Maŝin-fabriko de Pekino faras kontrolon al nove konstruitaj tutfoliaj, dukoloraj, aŭtomataj ofsetaj presmaŝinoj.

